

4^a JARO.

OCEANIO

N^{ro} 1

TRA LA MONDO.

· TVTMONDA · ILVSTRATA · REVUO · ESPERANTISTA ·

JULIO
1908.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

TRA LA MONDO: Bruĝo la vivanta, de *L^{to} Van Weyenbergh* (FLANDRO). Mek-
tub, el la algeria virina vivado, de *A. Baissac* (ALĜERIO).

DIVERSAJ SCIENCŬOJ: Senfadena telefonio. La fotografado reliefa de *Marcel
Finol* (FRANCUJO). La skota lingvo kaj Esperanto de *James Mal-
loch* (SKOTLANDO).

DIVERSAĜOJ: Vojaĝo en Kaŝmirujo, de *Kolonelo H. H. Hart* (ANGLUJO).

ĈIULANDA LITERATURO: Richard Jefferies, de *J. C. Snape*, kun eltirajo de
« La Hejmo de l' Ĉasgardisto » de *R. Jefferies* (ANGLUJO).

MILITISTARO KAJ MARISTARO: La Sieĝo de Zaragoza (HISPANUJO), laŭ
Generalo Marbot, tradukita de *K^{no} Capé*.

TEATRAĜO: Edziĝa propono, de *A. Ĉehov* kaj *R. Frenkel* (RUSUJO).

NUNTEMPAĜOJ: La kongreso de l' Arto ĉe la Lernejo, de *S. Durieux*.

MIKSAĜOJ: Internaciaj enketoj, de *Soj Rollet de l'Isle* kaj *Durieux* (FRANCUJO),
R. Frenkel (SIBERUJO).



Abono. Jara : 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona : 4.50 fr. (1,80 Sm.).

La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Adreso: « Tra la mondo » Meudon (S, & O.) France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de
landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago
de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva
valoro.

Oni skribu legeble, sur respond-poŝtkarto; aŭ oni
aidonu respondkuponon al la leteroj.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 sd).

Oni rememorigu ĉiam pri sia adreso.

Adressaĝoj estas farataj nur laŭ pelo akom-
panata de 50 centimoj (20 Sd.)

CAROLINE
1907. OXFORD, E.V.

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.

ATENTU, Sinjorino

vi ekdikiĝas, kaj dikiĝi estas maljunigi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reigos svelta.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY**.

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

Ir- kaj reiraj biletoj je 1^a kaj 2^a klasoj de Paris ĝis la limpunktoj svisaj ĉi subaj, liver- eblaj kune kun kartoj je ĝeneraj svisaj abonoj.

La staciagentejo de Parizo liveras ir- kaj reirajn biletojn je 1^a kaj 2^a klasoj, uzeblajn dum 48 tagoj, por Genevo, les Verrières-frontière, Vallorbe-frontière kaj Villers-frontière (sen reciprokeco).

Tiuj biletoj, kiuj kostas 87 fr. (34,80 sm.) por la 1^a klaso kaj 64 fr. (25,60 sm.) por la 2^a, entenas la eblecon iri de Parizo en Svisujon tra iu ajn el la limpunktoj ĉi supre cititaj, kaj reveni aŭ ĉe Paris-P. L. M., tra iu ajn el tiuj punktoj, aŭ ĉe Paris-Est tra Delle-frontière aŭ tra Bâle-Petit Croix. Ili estas liverataj ekskluzive al la vojaĝantoj, kiuj prenas samtempe svisan abonkarton por 15, 30 aŭ 45 tagoj, uzeblan sur la ĉefaj fervojoj kaj ŝiplinioj svisaj.

La prezoj de l'ĝeneraj svisaj abonoj estas:

Abonoj por 15 tagoj:

1^a klaso: 80 fr. (32 sm.) — 2^a kl.: 55 fr. (22 sm.) — 3^a kl.: 40 fr. (16 sm.).

Abonoj por 30 tagoj:

1^a kl.: 120 fr. (48 sm.) — 2^a kl.: 85 fr. (34 sm.) — 3^a kl.: 60 fr. (24 sm.).

Abonoj por 45 tagoj:

1^a kl.: 160 fr. (64 sm.) — 2^a kl.: 110 fr. (44 sm.) — 3^a kl.: 80 fr. (32 sm.).

Krom la ĉi supraj prezoj, oni devas pagi 5 fr. (2 sm.) da garantiaj, redonotaj al la vojaĝanto, kiam li redonas la karton vojaĝ- fine. Por pluj sciigoj, oni legu la Livret-Guide-Horaire P. L. M. aĉeteblan ĉe ĉiuj stacidomoj por 50 cm. (0,20 sm.).

VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN
laŭ la 78^a milo franca tradukis
EMILIO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe liaj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj S^{ro} Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, manuskriptoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por erarojn aŭ prokrastojn.

Urgaj sciigoj: REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu m. por la tuj elironta Numero.

ONI ABONAS ĉe nia administracio (Vidu la 1^{an} paĝon) aŭ ĉe la esperantistaj gazeto- abonejoj. Oni aldonu ĉiam la abonpagon.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (FRANCO)

SENPAGAN TARIFON

ESPERANTEMJ ORGANJOJ.

Le Phare Sténographique. Revue mensuelle illustrée. Organe Sténo-Daetylographique et Espérantiste. Francujo 3 fr. Fremdlande 4 fr. 1,60 Sm. 60, Rue des Carmes, Rouen.

Les langues vivantes. Duonmonata ilustrata revuo por praktika instruo de l'vivantaj lingvoj. Aperas angle, france, germane, hispane, itale, kaj Esperante. Francujo 3 fr. Fremdlande 4 fr. 1,60 Sm. 4, rue Madame, Paris.

Rumana Esperantisto, oficiala organo de Rumana esperantista Societo. Bela dumrevuo, enhavanta ĝojigan sciigon pri la reso de la Reĝino de Rumanujo (en litero « Carmen Sylva ») al Esperanto. 5 fr. Bukareŝto, 5 str. I. C. Bratianu.

The Esperanto News. Duonmonata propra organo en angla lingvo kaj Esperanto. 2 Sm. 10, Wall Street, Room 510, New-York.

ARMÉE ET MARINE.

Duonmonate ilustrita revuo de l' teraj kaj maraj armeoj.

Korespondantoj en ĉiuj landoj.

JARE:

Francujo, 12 fr. — Fremdlande 18 fr. 7,20 Sm.
Unu Numero 40 c. 16 Sd.

Administracio:

9, Boulevard des Italiens, Paris.

The British Esperantist

Oficiala organo de

The British Esperanto Asocio

Jare 4 fr. (1,60 sm.)

Ĉe « The British Esperanto Asocio ». M. Buildings, High Holborn, W. C., London.

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn NE esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.
(Internacia esperantista librejo)

LA INTERNACIA TRINKAĵO VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark No 270,042


Registered Label No 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONTO

Buchanan, Scott &

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando)



S^{ro} MAICHE EN SIA LABOREJO.

Senfadena Telefonio. (1)

Ĉar la senfadena telegrafio (kies multaj malfacilaĵoj cetere ne estas tute solvitaj) estas internacie praktikata, oni estus malprava se oni kredus, ke la problemo de la senfadena telefonio estas solvita. La malfacilaĵoj ne estas samaj.

En la telegrafio, sola movado, fermo aŭ malfermo de flurondo malproksima de relajo dum tre mallonga tempo, produktas liniojn kaj punktojn laŭ interkonsentita alfabeto. Sed oni certe ne povus tiel transsendi skribaĵojn, nek ankaŭ la multajn kaj malsimplajn vibradojn de l'organo tiel delikata de la voĉo homa.

Tamen, de kelkaj monatoj, ŝajnas ke oni estas proksima al la solvo de tiu pasianta problemo. Kuriozaj eksperimentoj estis farataj en Lyngby kaj Esbzeib (Danujo) kaj poste sur ŝipoj militaj de Ameriko.

Fizikisto Poulsen, pri kies eltrovoj mi jam parolis (T. L. M. III, 67) anstataŭigas la oscililon de senfadena telegrafio per arkklampo elektra lokita en atmosfero de hidrogeno, de lumgazo, aŭ de ia hidrogenkarbido, kiu emas multobligi la oftecon de la fluo. La fajreroj de tiu arko krevas inter du polusoj de elektromagneto. La aparato estas malmulte kosta; dinamomaŝino de 2 ĉevalpovoj naskas fluron kun 40.000 osciladoj ĉiu-sekundo.

En la flurondo de tiu arko kiu *kantlas*, t. e. eligas bruadon senĉesan, oni metas, inter anteno kaj tero, ordinaran mikrofonon. La vibradoj de la voĉo, ricevataj kaj aliformigitaj de tiu mikrofono, emas variigi la oftecon kaj amplekson de tiuj vibradoj, kiuj estas transsenditaj tra spaco al ricevaparato, kaj ĝin movigas.

Sed tiuj alternaj fluoj ne povas agi sur la telefonan ricevilon, kies tavolo obeas nur samsencan fluron. Oni uzis diversajn

rimedojn, el kiuj la plej taŭga estas tiu de S^{ro} Forest; li uzas *aŭdion* (aŭskultilon), kiu aliformigas tiujn fluojn, t. e. ebligas la trairon nur de unusenca fluo.

Do se la ondoj ne estas ŝanĝitaj en la elsendloko de la mikrofono, la telefono estas muta; sed, tuj kiam la mikrofono parolas, la fluo, kiu trairas la aŭskultilon, vibrigas la tavolon telefonan, kiu reproduktas perfekte la voĉon.

Oni povas atingi proksimume la sekreton de la komunikadoj, uzante ondojn reguligitajn kaj elektitajn (T. L. M. III, 67); se la du postenoj estas perfekte akordiĝintaj, la ondoj de la unua posteno agas sur la aparaton ricevan, kaj nur sur ĝin.

En Danujo, sur tero, oni povis paroli ĝis interspaco de 5-6 kmj; sur maro, oni sukcesis paroli kelkafoje ĝis 32 kmj, sed nur malofte: ordinare oni atingis 15 kmj, unue sur lago Erié, poste sur maro, kun la du ŝipoj *Virginie* kaj *Connecticut* de amerika ŝiparo.

Sendube tiuj eksperimentoj ne estas sufiĉe taŭgaj, sed oni devas memori, ke, dum siaj unuaj eksperimentoj de senfadena telegrafio, S^{ro} Branly sendis ondojn nur ĝis la ekstremaĵo de sia ĝardeno. Plie, se oni opinias, ke la telefonio estas multe pli prokrasta ol telegrafio, oni memoru, ke la eltrovo de ordinara telefonio, de Graham Bell, okazis pli ol 50 jaroj post tiu de telegrafio, de Morse.

La fotografado reliefa.

Kiam tra via fenestro vi rigardas pejzaĝon, vi vidas ĝin reliefe; se vi rigardas dekstren aŭ maldekstren, la ŝajno de la pejzaĝo ŝanĝiĝas: ĝi havas nek samajn mallumaĵojn, nek samajn lumajojn, nek samajn kolorojn. Se vi rigardas person-

(1) Vidu en « Tra la Mondo », II^a J. 6^a N., la artikolon pri la laboroj de S-ro Maiche, kiu, la unua, sukcesis telefoni sen fadeno.

on, vi havas en la okuloj vivantan figuraĵon. Sed se vi fotografas tiun pejzaĝon, tiun personon, vi havas nur figuraĵon mortintan, sen profundeco, sen reliefo, videblan nur sub sama angulo.

Tial iaj scienculoj revis procedon pri fotografado reliefa, kapabla montri la diversajn vidigojn de naturo. Tio ĉi ŝajnas neebla: tamen S^o Lippmann, kiu donis jam unuan solvon de fotografado de koloroj, eltrovis simplan procedon por solvi tiun problemon.

Sur la du flankoj de plato fotografa, li metis emulson de kolodio dika je $\frac{1}{10}$ mm, kiun li vaflumis (1) por havi ĉiuflanke retajon el duonsferoj mikroskopaj, po 25 en 1 mm². Sur unu flanko, ĉiu duonsfero estas kvazaŭ lenso aŭ grandangula objektivo; la duonsfero aliaflanka estas kovrita de impresbla emulso: la kunigo de tiuj du duonsferoj estas plato, kies kurbeco certigas la enfokusigon perfektan kaj precizan sur tuta surfaco. Ĉiu aro da du lensoj estas do malgranda kamero nigra, kaj la ero de kolodio, kiu estas inter du ĉeloj estas nigrita, por ke la lumaj radioj oblikvaj ne emu trairi de unu al alia.

Ĉar la fokusa interspaco estas ono de milimetro, ĉiuj objekt-oj estas enfokusigitaj tuj de unu malgranda interspaco. Ĉiu lenso sendos sur la platon figuraĵon mikroskopan de la pejzaĝo,

kaj la figuraĵo ŝanĝiĝos de unu al alia ĉelo, ĉar la vidpunkto estas malsama.

Se oni rigardas poste la kliŝaĵon tra lumo, oni ne vidas la tutan figuraĵon: dank' al la eco de akomodigo de okulo, oni vidas nur unu punkton de ĉiu fotografajeto; la aro de tiuj punktoj donas tutan figuraĵon. Ĉar la loko de ĉiu punkto varias laŭ la loko de l'okulo, oni povas do vidi pejzaĝon de diversaj vidpunktoj, tiel nature kiel tra nia fenestro. Sola fotografajeto permesas vidi personon face, profile, flanke. Se oni rigardas per du okuloj, la kondiĉoj de vidado stereoskopia estas efektivigitaj, la reliefo aperas tra la spaco.

La teorio de tiu eltrovo estas treege simpla. Tamen la kliŝaĵoj ĝis nun faritaj estas neperfektaj: oni devas ankoraŭ solvi kelkajn malfacilaĵojn, ekzemple atingi platon de kolodio tute egale dikan, kaj tute nigri la ligitajn de la ĉeloj. Tiuj malfacilaĵoj ne estas nevenkeblaj, kaj oni povas esperi, ke scienculo Lippmann trovos baldaŭ definitivan solvon.

MARCEL FINOT.

(1) Vaflumi, fr.: gaufrer; germ.: waffeln.



LA SKOTA LINGVO KAJ ESPERANTO.

Eble multe da miaj legantoj scias, ke en kelkaj partoj de Skotlando, kiel ankaŭ en Kimrujo kaj Irlando, oni parolas du lingvojn. Oni povas diri, ke nuntempe, escepte en la malproksimaj altlandoj kaj kelkaj okcidentaj Skotaj insuloj, la tuta skota loĝantaro parolas kaj komprenas la anglan lingvon. Ekster la angla lingvo ekzistas en la Skotaj altlandoj alia lingvo, kiun parolas la tieaj loĝantoj, nome la celta aŭ Gaelic (elp. Gelik) lingvo. Tiujn du lingvojn parolas kaj komprenas egalfacilece la altlandaj enlanduloj.

Tamen en la tre malproksimaj kaj malpli alireblaj partoj de la Skotaj altlandoj kaj okcidentaj insuloj ekzistas homoj, kiuj parolas nur Gaelic'on, kaj kiuj povas nek paroli nek kompreni la anglan lingvon. La nombro de tiaj personoj ĉiujare malpligrandiĝas kaj, malgraŭ la plej fervoraj penadoj de siaj subtenantoj por konservi ĝin, la « Gaelic » lingvo, iom post iom malpli uzadiĝas, kaj la angla anstataŭas ĝin. Tio iomgrade estas la rezultato de la fervoja kaj vaporŝipa disvastiĝado kaj pli ofta kontakto de la altlanduloj kun la urbanoj. Ĉiujare multe da altlanduloj forlasis siajn hejmojn inter la montoj, por trovi okupon ĉe la urboj, kie en la daŭro de la tempo ilia gepatra lingvo perdiĝas.

Iam la skotaj malaltlandanoj (lowlander) paroladis propran lingvon tute apartan je « Gaelic » kaj la angla lingvo. Tio estis la antikva skota lingvo, kiu, oni diras, estas formo de la teŭtona aŭ germana lingvo, kaj estis enkondukata en Skotlandon ĉirkaŭ la kvina jarcento.

Ĝis 1475 ne diversas materiale la skota lingvo de la tiam nordorienta Angluja lingvo. De la dirita jaro la skota lingvo prenis sur sin nacian karakterecon, kiu daŭris ĝis ĉirkaŭ 1650. En 1603, kiam okazis la unuigo de la skotaj kaj anglaj regkronoj, reĝo James VI^a de Skotlando fariĝis reĝo de Anglujo, kaj la kortego forlasis Skotlandon por restadi ĉe Londono. Kiel rezultato, la angla fariĝis la lingvo de la korteganoj kaj de la nobeluloj, kiuj postsekvis sian reĝon en Londonon.

De 1650 la skota lingvo dividiĝis laŭ dialektoj, kies ĉefaj estas la suda, la centra, kaj la nordorienta. La skotaj malaltlandanoj paroladis tiun ĉi lingvon

dum la du sekvintaj centjaroj, sed nuntempe ĝia uzado preskaŭ estingiĝas kaj, krom en kamparaj regionoj, oni tre malofte aŭskultas ĝin. La skota nacia poeto Robert Burns (1759^a ĝis 1796^{aj}) grandgrade uzas la sudan skotan dialekton en siaj senmortaj poemoj, kaj Sir Walter Scott, la fama aŭtoro de la « Waverley Novels » (romanoj) priskribante lokajn homtipojn verkas per ĝi. Tiel ankaŭ al la sama celo klopodas la hodiaŭaj populaj verkistoj. La skota lingvo estas tre esprimplena, kaj por priskribi homojn, manierojn, ideojn, kaj kutimojn speciale skotajn, pli taŭgas ol la angla lingvo. La skotaj lingvaj nuancoj estas kelkfoje tre delikataj, kaj tre ofte estas neeble, trovi anglajn vortojn, por ĝuste esprimi iliajn signifojn.

Por esperantistoj, komparo de la skota lingvo kun Esperanto estos sendube tre interesa. Unue ni citu la skotan vorton « minnie » kiu signifas « patrino » (angle « mother »). Jen ni havas ekzemplon de la sufikso « ino », kiu devenas de la germana. La malsupra tabelo de skotaj vortoj, kun Esperanta kaj anglaj tradukoj, sufiĉas por montri, ke, rilate al la formo kaj elparolado, skotaj vortoj ofte pli similas al Esperanto, ol la angla lingvo.

| <i>Skote</i> | <i>Esperante</i> | <i>Angle</i> |
|--------------|------------------|----------------|
| aiblins | eble | perhaps |
| aumos | almozo | alms |
| egal | egalo | equal |
| fremit | fremda | strange |
| grosart | groso | a gooseberry |
| kist | kesto | a chest |
| kep | kapti | to catch |
| mank | manko | want |
| patrick | perdriko | a partridge |
| tassie | taso | a drinking cup |
| tent | atenti | to look to |
| vauntie | vanta | proud |
| youky | juka | itchy. |

Oni povus daŭrigi la komparon per multaj aliaj skotaj vortoj similaj al la Esperantaj.

JAMES MALLOCH,
el Edinburgo, Skotlando.



DIVERSAĴOJ



Vojaĝo en Kaŝmirujo.

de Kolonelo H. H. Hart,



TIPO DE BENGALANINO.

Hinduj agitiĝas, kaj oni estus trovinta veran komploton anarĥiistan kaj grandegan revoluciemman movadon. Kiel dum la fama ribelo de Cipajoj dum la jaro 1857, la centro de la movado estus en Bengalo. Ankaŭ ribelo okazis en Penĝab ĉe la landlimo de Afganistan, kaj la sintenado de l'emiro Habib Ulla ne estis, komence, tre klara.

Ni estas feliĉaj, povi enpresi hodiaŭ rakonton pri ekskurso en regiono najbara de Penĝab, aŭfable senditan de nia estiminda samideano Kolonelo H. H. Hart.

En la monato septembro, mia edzino kaj mi decidis, ke ni vizitos du montajn lagojn kuŝantajn sur la montego Haramook. En tiu tempo nia tendaro staris en vaio alta je 2100 metroj.

Tuj kiam niaj kaŝmiraj servistoj estis farintaj ĉiujn necesajn aranĝojn pri kuli'oj (portistoj de pakajoj k. t. p.), ni ekiris tre frumatene. Mia edzino estis portata en « dandy » (speco de portebla seĝo) de ok portistoj, sed kelkfoje ŝi estis devigata piediri pro la kruteco kaj malbonstato de la vojeto. Mi piediris, ĉar estis neeble rajdi. La monta vojeto estas tre mal-larĝa, tre kruta, zigzagas laŭ la flanko de la montego. Ni malrapide suprenrampis. La sunvarmo estis intensa kaj lacigis min pli ol la piedirado. De tempo al tempo la vojeto trairas abiarojn. Post 1200 metroj da supren-rampado ni starigis la tendojn apud malgranda rivero.

La sekvintan tagon ni alvenis al la lagoj, kiuj troviĝas ĉe nivelo je 3900 metroj; la pli granda havas longecon je tri kvaronoj da milo kaj larĝecon je kvaronmilo. Super la lagoj troviĝas glaciejoj, nuntempe ne tre grandaj, sed oni facile povas vidi, ke dum ia antikva epoko ili estis grandeg-aj, ĉar ĉie oni vidas grandegajn morenojn, glacian koton, kaj ŝtonegojn. La koloro de l' pura, hela akvo de la lagoj estas bluverda, preskaŭ smeralda.

Mi vidis nenian sovaĝan beston, sed la ĉasistoj tie renkontas ursojn ruĝajn kaj ankaŭ nigrajn, panterojn, cervojn. Kampaj floroj de multaj specoj troviĝas; la plej malofta estas kreskaĵo, kiun oni nomas blua papavo, mi ne scias la teknikan nomon, sed kvankam ĝi iom similas al

papavo, tamen certe tio ne estas. Mi vidis kelkajn papiliojn kaj tre multe da burdoj. Nur malmulte da birdoj troviĝas, mi nur vidis korvojn, kolumbojn kaj milvojn: en la nokto oni aŭdadis la malgajan noton de la gufo.

La plej alta pinto de Haramook estas 5152 metroj super la marnivelo.

Ripozinte unu tagon, ni malsupreniris la montegon, kaj ree starigis la tendaron sur la valo. Ni ne tre malĝojis, kiam la tempo de l' foriro alvenis, ĉar vivas tie multe da viperoj; ili ne estas tre venenaj, oni fariĝas malsana post ilia ek-mordo, sed oni certe ne mortas pro ĝi. Mi mortigis ses serpentojn en la daŭro de tri semajnoj, unu el ili estis enirinta en la tendon.

Por « Tra la Mondo » de
Kolonelo H. H. HART.



TIPOJ DE BENGALANOJ.

NUNTEMPAĴOJ

Kongreso de l' Arto ĉe la Lernejo.

Ĉu vi memoras artikolon per kiu «Tra la Mondo» konigis kongreson de l' arto ĉe la lernejo okazontan en «Lille», Francujo? Antaŭ ol raporti pri la laboroj de la kongreso, permesu, ke mi prezentu resumon de cirkulero antaŭsendita de S^{ro} Lyon, rektoro de l' Akademio «Lille», al siaj subuloj, la akademiaj inspektoroj regantaj la instruadon en kvin francaj departementoj. Vi juĝos la spiriton, kiu regis la kongreslaborojn.

La cirkuleron enpresis gazetoj kaj revuoj francaj. Plaĉas al mi, modesta instruisto, doni pli potencajn flugilojn al la penso de mia eminenta estro. S^{ro} Lyon permesas enkondukon de Esperanto en la edukejojn, kiuj estas sub lia estreco. Laŭ justa repago, Esperanto fariĝas lia danka servanto por senlimigi la ehojn de lia regiona entrepreno. La devo de Franco estas diskonigi la francajn ideojn. Ĉiuj instruistoj diras kaj rediras tion al siaj lernantoj, sed ĉiuj ne donas la tiel oportunan ilon, por fari la laboron proponitan. Miaparte mi dankas miajn estrojn, kiuj, de la unuagrada inspektoro ĝis ministro, permesas, ke mi instruu laŭracie tiom, kiom laŭregulare. Mi dankas pro konfido al mi, kiu estas konfido al la kolegaro.

Tie ĉi mi petas permeson de S^{ro} Montrosier. Gazetoj esperantistaj kaj aliaj, parolante pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn Lille'ajn, presis kaj represis mian nomon. Sekvis multaj kartoj kaj leteroj. De kelke da tempo mi serĉas okazon malhelpi, ke ĉiuj laŭdoj venu al mi flanklasante miajn estrojn, kiuj aranĝis, kaj miajn kolegojn, kiuj laboris. Montrante la parton de ĉiu, mi ankaŭ montris kiel sukcesis en «Lille» la afero, kiel ĝi eble povus sukcesi en aliaj urboj, kaj oni konsentis, ke tiu demando estas antaŭ por ni, esperantistoj, arto ĉe la lernejo.

De la jaro 1905^a, S^{ro} inspektoro Minet, mia senpera estro, akceptas ĉiumonatan priesperantan artikolon en la «Nord Pédagogique»; li petis ĉiujaran kurson en tiu lerneja revuo, konstatas la unuajn rezultatojn en mia klaso, kaj ilin notis en sia oficiala raporto; li kuraĝigis mian iniciativon gratulante la infanojn; li afable akceptadis instigajn dokumentojn, kaj fondis specialan sed ne devigan kurson por ĝeninstruistoj. Post matura pripensado, kun permeso de Sinjoro Prélat, direktoro de l' unuagrada instruado en la departemento «Nord», li organizis la esperantan instruadon en sia distrikto, kies ĉefurbo estas «Lille» (210.000 loĝ.) Fine li ĵus plenumis tiun organizadon, starigante laŭvolan jarfinan ekzamenon kun diplometo por esperantistaj lernantoj (geknaboj).

Mj aldona ion, kiu estus senutilaĵo, se ĝi ne estus respondo al seninforma aludo. S^{ro} Minet, unuaklasa inspektoro, kavaliro en la Honora Legio, faris kion li faris sen flanka priokupado, entaŭenpuŝita de sia personeco, kiu estas progresema kaj realigema. Li vidis tion, kio estas farebla per Esperanto en klaso, li rekonis la edukadan valoron de Esperanto je l' rilato pedagogia kaj sociala kaj, bona administranto, il aranĝis, proponis kaj atingis, kion oni scias, sed kion oni tro ofte aljuĝas al mi. Ĉu ne estus ĝuste kaj juste, se la historio de l' esperantismo montrus Sinjoron Minet kun S^{ro} Prélat kiel la unuajn, kiuj administracie enkondukis Esperanton en la lernejojn?

Mi ne timas ridindecon laŭdante miajn estrojn. Neniam oni estas ridinda plenumante sian devon, kaj mi dankas «Tra la Mondo» kiu faciligas la plenumon de la mia.

Jen estas do la cirkulerresumo. S^{ro} Lyon diris: Ni konsideru la rezultatojn, kiujn ni celas, kaj ĉesigu se eble la skeptikecan malkredemon, ĉiam rapidan proklami la senutilecon, aŭ antaŭdiri la malprosperon de novaĵo. Plej ofte skeptikismo estas nur oportuna masko de la malfervoro, kiu lerte malŝatigas, por sin liberigi de l' agado.

Kulturi la senton de l' naturo kaj tiun de la beleco ĉe l' arto, ĉu tio estas ebla? Ni respondas jes! Ĉiuj emoj ne absolute egoistaj estas kultureblaj kaj edukeblaj.

Sed se oni konstante direktados la scivolecon kaj guston de l' infano al gracieco, eleganteco, nobleco kaj belegeco, ĉu oni ne malstreĉos la risortojn de ĝia volo, ĉu oni ne inspiras al ĝi indiferecon al la informiĝo scienca aŭ al la morala penado? Nur profunda eraro naskus tian antaŭtimon. La popolo greka, la plej intelekta el ĉiuj, ne disigis la bonecon kaj belecon, kiujn ĝi nomis per sama vorto. Kaj, ni mem ĉiutage diras: «bela karaktero, bela animo, bela ago».

Kunsidoj kaj festoj. — La malferman konsidon prezidis

S^{ro} Dujardin-Beaumez ŝtata subsekretario de la Belartoj, Apud li sidis la estroj de la Lille'a kaj centra societoj, kaj ankaŭ du inspektoroj de l' instruado en Belgujo.

Post laboro, ripozo. En tiu unua tago okazis vizito ĉe la liceo, kies estrino estas S^{ino} Lempereur, tre fervora esperantistino. Ne forgeseblan feston ŝi dediĉis al la kongresantoj «en la plej bela francuja liceo». Ankaŭ okazis ekskurso al la vilaĝa lernejo en «Flers». Tiu ĉi lernejo ŝajnas maljuna kamparano freŝe tualetita kaj tere sidita inter floroj kaj verdaj. En la du klasoj mi rimarkis blankan plafonon kaj murojn palverde pentritajn. Sub la plafono kuras frontona plataĵo dukolora, reprezentanta diversajn metiojn, foliaron kaj fruktojn. La malsupra parto de la muroj estas griza kun nigra punktaĵo. La movebla dekoracio konsistas el bildoj troveblaj en librejoj, aŭ el ilustritaj paĝoj de ĵurnaloj artaj. La floroj ne mankis, eĉ estis ruĝaj fiŝoj naĝantaj gaje en larĝa pokalo. La ĝardeno estas belega kaj mi ĝin admiris pli, ol la cetero.

La studkomisiataro dividiĝis en 4 sekcioj: Arĥitekturo kaj ĝenerala dekoracio; Estetika edukado kaj priarta instruado; Muziko, dramarto, kalisteknika gimnastiko; Ĝeneralaj ideoj, l' Arto ĉe la lernejo en la modernaj demokratioj.

Oni laboris kuraĝe kaj ankaŭ kuraĝe oni festenis kaj festadis. En Franclando estas kutimo kredeble trovebla alilande. Ĉe familia manĝado oni kantas; ĉe solena oni diras paroladojn. Dum tagmeza festeno kelkaj aŭdiĝis; inter ili S^{ro} Bayet direktoro de l' supera instruado en Francujo: «Edukejoj devas esti beletaj kiel infana rideto; profesoro neniam devas altrudi la admiradon; libroj ilustritaj estas bonega edukada rimedo; pli ŝatos sin reciproke, dank' al l' arto ĉe la lernejo, la francaj edukistoj en la tri gradoj de l' instruado». Tiu temon S^{ro} Bayet traktis en lingvaĵo bela kiel virina rideto, simpla kiel kampa floro. Oni ne scias ĉu li parolis, ĉu li kantis.

Kongresanoj de l' Arto en la lernejo, vi estas herooj! Jen estas vi en festeno, en muzeo, en lernejo; jen estas vi en post-tagmeza festo, kaj vespere vi staras ankoraŭ ĉe koncerto je la «Domo de la Studentoj», belega festo por kiu penadis la sindona sekretario de nia Grupo, studento G. Barat.

En la ferma kunsido, la sekciaj sekretarioj legis siajn raportojn. Jen la konkludoj alprenitaj kaj komunikotaj sub dezirformo al la interesatoj kaj aŭtoritatoj. Sed laŭ ĝenerala deziro, Arto ĉe la lernejo neniam fariĝos afero administracia.

La muroj de la klasoj estas kovritaj per klara kolorigilo; floroj en potoj kaj en bukedoj ornamas fenestrojn kaj meblojn, precipe ĉe fraŭla lernejo; la pedagogian materialon oni elmetos nur dum la lecionoj. Grandaj fenestroj kun blankaj vitraĵoj; vespere resendado de la lumo per la plafono. Modera dekoracio de la klasoj per artaj gravuraĵoj; kiom eble oni uzos por tio lokajn rimedojn. Oni klarigos al la instruistoj la ĉefajn artverkojn. Nek estetika katekismo, nek historio de l' arto, sed nur gvidlibro-konsilanto por enkonduki iom post iom la arton en la lernejojn kaj sekve en la loĝejojn. Instrumentan muzikon oni ne trudos en normalaj lernejoj (pedagogejoj) sed oni rekomendos. En la unuagradaj lernejoj patrinaj (geknabetaj lernejoj) oni metode ekzercos la membrojn kun kantado. La kulturadon en la lerneja ĝardeno oni utiligos por instrui la infanojn, sed ankaŭ por ornami la klasĉambrojn. La delikateco de la impresoj estas celo atingota; devigaĵo estas ordo kaj pureco, sed oni penados, por ke la lernantoj sentu plezuron nur en ili. Malprava estas ĉi tiu aforismo: lernejo plaĉa malŝatigas hejmon. Estetikon oni ne altrudus. *La societo de l' Arto ĉe la lernejo* instigos kaj helpas la bonvolojn.

En ferma parolado S^{ro} Bayet diris: «La vivo fariĝas nun pli kaj pli persona kaj profitema, ni igu ĝin iom artema. La scienca spirito, ekzemple, mortigis la feinfabelojn. Tiujn rakontojn naskis la animo de la popoloj. Mi volus, ke ili reiru en la koron de la infanoj por porti en ĝin la senton de la beleco kaj boneco. Mi volus, ke tiujn fabelajn personojn preskaŭ forgesitajn, oni reprezentu sur la klasmurojn ne kiel profesorojn de moralo, sed kiel modelojn de konduto».

Mi estis kortuŝata aŭdante tiun eminentulon, kiu jam malproksima de sia infaneco, emocie parolas por la infanoj je l' nomo de siaj memoroj, je l' nomo de l' Arto kaj de l' Patrujo.

F. DURIEUX.



Epizodoj el la Sieĝo de Zaragoza.

Laŭ generalo MARBOT, imperia generalo.

La 1^{an} de Majo malfermiĝis, meze de granda homalfluo, la franca-hispana ekspozicio de Zaragoza, organizita okaze de la centa datreveno de l' milito por la hispana sendependeco. En sia parolado inaŭguraĉia Infanto Carlos (Karlos) insistis pri la amikeco, kiu unuigas nun Hispanujon kaj Francujon, kaj ĵus elmontriĝas per la organizo de l' ekspozicio. Samaj amikaj sentoj estis esprimataj la 14^{an} de Junio, ĉe solena inaŭguraĉio de reĝo Alfonso XIII^a, dum la ĉeesto de S-roj Cruppi, franca komercministro, kaj Revoil, franca ambasadoro en Madrid.

Estos sendube interesa por niaj legantoj rememorigo pri la teruraj militaj okazaĵoj nun solenigataj, dum kiuj la Hispanoj montris la plej admirindan obstinegecon kaj amon al la Patrujo, kaj la Francoj ne malpli admirindan kuraĝon. Malgraŭ troaĵojn de defendo ne ĉiam konforma al la leĝoj de l' milito, sed kompreneblajn pro la celo trafota, ili neniam agis nehumane. Grandparte sendube, pro la estiminda konduto de ambaŭ kontraŭuloj, tiuj ĉi ne restis malamikemaj unu al la alia, kaj la nuna amikeco estas ebla.

Ni eltiris la ĉi subajn liniojn el la tre interesaj memorskriboj de generalo Marbot, helpoficeiro de marŝalo Lannes, komandanto de l' sieĝarmeo (1). Ili interesos ankaŭ, eble, ĉar ili estas la unua Esperanta verko pri milito de la moderna epoko.

Antaŭ la granda kontraŭstarigo kaŭzota de la mallibereco de Ferdinando VII^a, la urbo Zaragoza ne estis fortikigita; sed eksciante la okazaĵojn en Barcelono, kaj la perfortojn intencitajn de Napoleono kontraŭ Hispanujo, por sidigi sian fraton Jozefon sur la tronon, Barcelono faris la signalon de la rezisteco. Ĝia multenombra loĝantaro starigis kvazaŭ unu sola homo; la monaĥoj, la virinoj, eĉ la infanoj sin armis. Vastegaj monaĥejoj, je muregoj dikaj kaj rezistkapablaj, ĉirkaŭis la urbon; oni ilin fortikigis, kaj provizis per kanonoj; estis ĉiuj domoj dente-boritaj, ĉiuj urboj barikaditaj; oni fabrikis pulvon, kuglojn, kugletojn, kaj oni amasigis grandajn buŝprovizaĵojn. Ĉiuj loĝantoj enviciĝis, kaj elektis kiel estron grafon Palafox, unu el la koloneloj de la korpogwardistoj, kaj sindonema amiko de Ferdinando VII^a, kiun li sekvis en Bayonne, de kie li iris en Aragonon post l'aresto de tiu reĝo.

Estis dum la 1808^a somero, ke l' Imperiestro sciigis la ribelon kaj la defendemajn projektojn de Zaragoza, kaj, pro la iluzioj naskitaj en lia spirito de la depeŝoj de Murat, li konsideris tiun kontraŭstarigon kiel pajlofajron, kiun estingus la sola alproksimiĝo de kelkaj francaj regimentoj. Tamen, antaŭ ol uzi la torton de l' armiloj, li volis provi la konvinkon. Li sin turnis al princo Pignatelli, la ĉefa landsinjoro de Aragono, kiu tiam estis en Parizo, kaj instigis lin, utiligi sian influon al la Aragonanoj, por kvietigi ilian agitadojn. Princo Pignatelli akceptis tiun pacan mision, kaj alvenis al Zaragoza. La loĝantaro alkuras al li, ne dubante, ke, laŭ l' ekzemplo de Palafox, li venas kontraŭbatali la Francojn; sed tuj kiam Pignatelli parolas pri submetigo, li estas ĉirkaŭatakata de la amaso, kaj nur savita el la pendigo de Palafox, kiu kondukigas lin en karceron (malliberejon), kie li restas naŭ monatojn.

Tamen kelke da francaj divizioj, kondukataj de generalo Verdier, prezentigis en Junio 1808 antaŭ Zaragoza, kies fortikaĵoj estis ankoraŭ tre neperfektaj. Oni volis akceli atakon; sed apenaŭ estis en la stratoj niaj kolonoj, ke mortiga pafado eliranta el la fenestroj, tegmentoj, sonorilejoj kaj kelspirejoj, devigis ilin, reeniri, pro la gravaj homperdoj faritaj. Niaj milittrupoj ĉirkaŭis tiam la urbon, kies sieĝon ili komencis pli metode. Kredeble ĝi estus sukcesinta, se la foriro de reĝo Jozefo, ne estus deviginta la francan korpuson sidantan antaŭ Zaragoza, retiriĝi ankaŭ, forlasante parton da sia artilerio.

Tiu unua sieĝo tiele malsukcesis; sed post venka reeniro en Aragonon, la marŝalo venis en 1809, ataki denove Zaragoza. Tiu urbo staris tiam multe plej favore por la defendo, ĉar ĝiaj fortikaĵoj estis finitaj, kaj la tuta militema loĝantaro de Aragono estis eniginta en la militplacon, kies garnizono estis ankaŭ fortigita per granda parto de la hispanaroj de la armeo de Castanos, batitaj de ni ĉe Tudela.

Tial la defendo disponis pli ol 80.000 homojn, dum la marŝalo havis da ĝi nur 30.000 por la sieĝo; sed ni havis lertegajn oficirojn. La ordo kaj la disciplino regis en niaj rangoj, dum nesperto kaj konfuzo estis en la urbo. La sieĝatoj nur interkonsentis pri unu punkto: sin defendi ĝis la morto!... La kamparanoj estis la plej obstinemaj! Kun edzino, infanoj, eĉ brutaroj, ili okupis urban kvartalon aŭ domon, kiun ili ĵuris defendi. Tie homoj vivis amase kune kun la brutoj, en plej naŭziga malpureco, ĉar ili eljetis nenian balaaĵon. La bestaj internaĵoj putriĝis en la kortoj, la ĉambroj; kaj la sieĝatoj eĉ ne penis, forporti la kadavrojn de l' homoj mortintaj pro la terura epidemio; kiun tia senzorgemo baldaŭ kaŭzis.

Sekve la religia fanatikeco kaj la sankta amo al la patrujo egigantaj ilian kuraĝon, ili sin allasis blinde al la *Dia volo*... Hispanoj multe konservis el

(1) Mémoires du général Baron de Marbot, 3 vol. ĉe E. Plon, Nourrit et Cie, 10, rue garancière, Paris.

la araba karaktero, kaj estas fatalistoj; tial ili senĉese rediris: « Lo que ha de ser no puede faltar... » (kio devas okazi, tio okazos). Konsekvence ili neniel antaŭzorgis.

Atakante tiajn homojn perforte en urbo, kie ĉia loĝejo estis fortikajeto, oni estus renoviginta la eraron faritan dum la unua sieĝo, kaj riskinta grandajn perdojn, sen ia sukcesa ŝanco. Marŝalo Lannes kaj generalo Lacoste, pionira ĉefo, agis do laŭ prudenta metodo, kiu, malgraŭ sia malrapideco, devis okazigi la kapitulacion aŭ la detruon de l' urbo. Oni komencis, laŭkutime, konstrui kavvojojn por atingi la unuestarantajn domojn; ilin oni subminigis, kaj eksplodigis kun iliaj defendantoj; poste oni subminigis aliajn, kaj tiel plu. Sed tiuj laboroj estis tre danĝeraj por la Francoj, ĉar tuj kiam unu el ili ekaperis, li iĝis celo por la pafoj de la Hispanoj kaŝitaj en la najbaraj konstruaĵoj. Tiel pereis generalo Lacoste en la momento, kiam li starigis el tegmentofenestro, por ekzameni la internon de l' urbo. La furiozeco de l' Hispanoj estis tiel granda, ke, dum kiam oni subminigis domon, kaj kiam la neakra bruo de l' martelbatoj antaŭsciigis ilin pri l' alproksimiĝo de l' morto, ne eĉ unu forlasis la domon, kiun li juris, defendi... Ni aŭdis ilin, kanti litaniojn; poste, tuj kiam la muroj, post disflugo en l' aero, terenfalvis frakase, subpremante la plimulton el ili, ĉiuj desavitaj grupigis sin malantaŭ ia ajn ŝirmaĵo, de post kiu ili rekomencis, pafi!... Sed niaj soldatoj, antaŭsciantaj pri la momento, kiam la mino ŝprucos, staris pretaj, kaj tuj post la eksplodo ili rapide saltis sur la rubaĵojn, mortigis ĉiujn trovatajn, starigis malantaŭ murpecoj, konstruis ŝirmajojn per mebloj, traboj, kaj meze de tiuj rubaĵoj aranĝis trairejojn por la pioniroj subminigantaj la najbaran domon... Ĉar granda triono el la urbo estis tiel detruita, oni povis vojtrovi nur per stangoj plantitaj de l' pioniraj oficiroj. Krom la mino, la Francoj uzis multnombrian artilerion, kaj ĵetis ĝis dekunu miloj da bomboj en la urbon!...

Malgraŭ tio, Zaragoza rezistadis!... Vane la marŝalo, kortuŝita pro kompatato al tiuj heroecemaj defendantoj, sendis militambasadon por proponi al ili honorindan kapitulacion... ĝi ne estis akceptata. La sieĝo daŭris. Sed la mino, kapabla detruiri la domojn, estis senpova kontraŭ la monaĥejoj: tro grandaj laboroj estus estintaj necesaj. Oni do nur disfalis parton de iliaj dikaj muregoj, kaj, tuj kiam la breĉo estis farita, oni tra ĝi enkurigis atakegan kolonon. La sieĝatoj alkuris por la defendo: ĝi estis terura; tiel en tiaspecaj atakoj ni faris la plej gravajn perdojn.

La plej bone fortikigitaj monaĥejoj estis tiuj de l' Inkvizicio kaj de Santa-Engracia. Niaj pioniroj, alvenintaj apud tiu ĉi, estis subminigintaj unu el la muroj, kiam la marŝalo, alvokinte min meze de l' nokto, diris ke, por akirigi al mi rapide la gradon de majoro, li rezervis por mi pleje gravan mision: « Je l' tagiĝo oni ekbruligos la minon difinitan, por malfermi la muron de Santa-Engracia; ok kompanioj da grenadistoj estas pretaj por l' atakego; mi ordonis, ke ĉiuj kapitanoj estu elektitaj inter la malpli malnovaj ol vi; mi donas al vi la komandon super tiu kolono; potencu la monaĥejon, kaj mi estas certa, ke baldaŭa kuriero de Parizo alportos vian diplomon de majoro! » Mi danke akceptis, kvankam mi multe suferis pro mia lasta vundo. La viandoj cikatriĝante estis farintaj

rondkajon; kaj, por ebligi surmeton de milita kapvesto, doktoro Assalagny, ĉefhirurgiisto de l' gvardiaj rajdĉasistoj, ilin malaperigis per infera ŝtono (argenta nitrato). Ĉar tiu tre dolora operacio okazis la antaŭtagon, mi suferis pro febro, kaj, sekve ne estis en tre bona stato, por kuratakegi. Tute egale! Ŝanceliĝo ne estis ebla; cetere mi malneas, ke mi estis tre fiera pro la komandeco, kiun la marŝalo komisiis al mi: ok grenadistaj kompanioj al mi, nur kapitano, tio estis grandebela!...

Mi do rapidas min prepari, kaj, je la tagiĝo, mi aliras la fosvojn, kie mi trovas generalon Razout. Al mi li donas la komandon, kaj rimarkigas, ke, ĉar pulvoj povos esti ekbruligitaj nur post unu horo, estus saĝe, se mi uzus tiun tempon, ekzamenante la muron renversotan de l' mino, kaj kalkulante la larĝecon de l' breĉo rezultanta, por prepari mian atakon. Mi deiras, akompanata de pionira adjudanto, kiu devis min konduki meze de l' ruinoj de vasta kvartalo jam disfalisita, kaj mi alvenas al la piedo de l' monaĥeja muro. Tie finiĝis la terspaco de ni al militita. Mi estis en malgranda korto; pike-do da voltijoroj okupantaj kvazaŭan kelon najbaran, havis en tiu korto gardostaranton, ŝirmitan kontraŭ la pafoj per amaso el plankoj kaj pordoj. Montrante al mi dikan muron antaŭ ni starantan, la adjudanto al mi diris, ke ĝin oni disfalis, tuj kiam la mino estos preta; ĉe unu el la kortaj anguloj, kie oni deŝiris pumpilon, la falo de kelkaj ŝtonoj okazigis truon; la gardostaranto rimarkigas al mi, ke, sin klinante, tra tiu malfermaĵo oni ekvidas la krurojn de multnombra malamika soldataro staranta en la monaĥeja ĝardeno. Por certigi pri la fakto, kaj konatiĝi kun la formo de l' teraĵo, sur kiu mi estas batalonta, mi malaltiĝas... sed, ĵus, Hispano postenita sur la sonorilejo de Santa-Engracia alpaŝas al mi, kaj mi falas sur la pavimo!...

Komence mi sentis nenian doloron, kaj kredis, ke la adjudanto min puŝis senatente; sed baldaŭ la sango elŝprucis kvazaŭbole; mi estis ricevinta kuglon en la maldekstran flankon, apud la koro!... La adjudanto helpis min releviĝi, kaj mi eniris en la kelon okupitan de l' voltijoroj. Mi perdis tiom da sango, ke mi preskaŭ svenis. Ne estis brakportiloj; la soldatoj subpasigis do pafilon sub miaj brakoj, alian sub miaj poplitoj (subgenuoj), kaj min kunportis tiel tra la mil kaj unu pasejoj aranĝitaj en la rubaĵoj de tiu vasta kvartalo, ĝis la loko, kie mi lasis generalon Razout. Tie mi rekonsciigis. La generalo volis, min bandaĝi, sed mi preferis la flegojn de doktoro Assalagny; kaj kunpremante mian vundon per mia naztuko, mi kondukigis min al la stabejo de marŝalo Lannes, sidigita je kanonpafa distanco el la urbo, en la vastega konstruaĵo de forlasita gastejo, ĉe la loko nomita la *Kluzoj de l' Aragona kanalo*.

Vidante, ke mi alvenas tute sangumita, portata de soldatoj, el kiuj unu subtenas mian kapon, la marŝalo kaj miaj kamaradoj kredis min morta. Doktoro Assalagny certigis la kontraŭon, kaj rapidis, min bandaĝi; sed oni ne sciis, kien min loki, ĉar ĉiuj mebloj estantaj brulitaj dum la sieĝo, ne plu estis unu sola lito; ni dormis sur la brikoj, per kiuj la ĉambroj estis pavimitaj. La marŝalo kaj ĉiuj kamaradoj miaj tuj donis siajn mantelojn, kaj oni kuŝigis min sur la amason el ili formitan. La doktoro esploris mian vundon, kaj trovis, ke mi estas ricevinta ĵetajn kredeble *platan*, ĉar ĝi pasis inter du ripoj, ne

ilin rompante, kion ne povus fari ordinara kuglo.

Por trovi tiun ĵetajon, Assalagny enigis sondilon en la vundon... li trovas nenion!... Lia vizaĝo iĝas malkvieta; kaj aŭdante, ke mi plendas pro akraj doloroj ĉe la lumbo, li kuŝigas min terenventre, kaj palpas mian dorson... Sed apenaŭ li tuŝis la kuniĝejon de la ripoj kaj de l' vertebraro, ke mi devige ekkrias; la ĵetajo estis tie! Nun Assalagny, sin arminte per bisturio, faras grandan entranc̄on, ekvidas metalajn sin prezentantan inter du ripoj, kaj volas, ĝin eltiri per pinĉiloj. Sed ne sukcesinte, malgraŭ viglaj penadoj, kiuj levis min, li sidigas unu el miaj kamaradoj sur miajn ŝultrojn, alian sur miajn poplitojn, kaj sukcesas fine, elŝiri plumbkugleton pleje grandkalibran, kion la fanatikaj Hispanoj platigis kvazaŭ malgranda monero, per martelbatoj. Kruco estis gravurita ĉiuflanke; fine ĉirkaŭaj tranĉoj similigis la kuglon al horloĝrado. Pro tiuj kvazaŭaj dentoj, sin lokintaj inter la muskolojn, estis tiel malfacila la eltiro. La tiel martelpremita kuglo, tro larĝa por eniri en pafilon, estis sendube forĵetinta per « tromblon'o » (konusformtuba pafilo); sin prezentante oblikve, ĝi agis kvazaŭ tranĉilo, pasis inter du ripoj, ĉirkaŭiris la internon de l' kofro, kaj eliris sammaniere, kiel ĝi eniris, feliĉe konservante sufiĉe da forto, por trairi la muskolojn de l' dorso.

La marŝalo, por konigi al la Imperiestro, laŭ kia fanatika obstinegeco sin defendis la Zaragoz'anoj, sendigis al li la kuglon. Napoleon'o post ekzameno, ĝin portigis al mia patrino, ŝin sciigante, ke mi estas tuj nomota skadrestro.

Doktoro Assalagny estis unu el la plej lertaj ĥirurgiistoj de sia epoko, kaj dank'al li mi rapide resaniĝis je mia vundo, kiu povis iĝi mortiga. La marŝalo posedis meĥanikan liton, kiu lin sekvis ĉiam dum la militoj; li havis la bonecon, pruntedoni al mi matracon kaj litukojn; mia mantelujo uzigis kiel kapkuseno, kaj la mantelo kiel kovrilo; malgraŭ tio mi estis malkomforta, ĉar la vento kaj la pluvo eniĝis en la ĉambrom, senigitan je pordoj kaj fenestroj. Plue, ĉar la teretaĝo de l' gastejo estis uzata kiel ambulanco, mi havis malsuper mi grandan nombron da vunditoj, kies ĝemoj pligravigis miajn

dolorojn. La naŭzeiga odoro, kiun dissendis tiu hospitalo, alvenis ĝis mi; pli ol ducent soldatnutraj-istoj estis starigintaj siajn budojn ĉirkaŭ la generala stabejo; tendaro estis apude; estis do kantoj, krioj, tamburuladoj neĉesaj; kaj, por aldoni al tiu infera muziko, la baso estis farata de granda nombro da kanonoj, pafantaj nokte kaj tage al la urbo!.. Mi ne povis dormi. Mi pasigis dekkvin tagojn en tiu malgaja stato; fine mia fortika naturo triumfis (1), kaj mi povis leviĝi.

La morto terure frapis en la loĝantaro kaj garnizono de Zaragoza, ei kiu, pro la tifuso, malsatego, fajro kaj fero, granda triono pereis; tamen la aliaj ne pensis, kapitulaci, malgraŭ la perdo de la plej gravaj fortikaĵoj, kaj la detruo de ampleksa parto de l' urbo. Ĉar la monaĥoj konvinkis tiujn ĉi malfeliĉulojn, ke la Francoj ilin gorĝtranĉus, neniu kuraĝis, eliri el la urbo; kiam hazardo kaj la animgrandeco de marŝalo Lannes okazigis la finon de tiu memorinda sieĝo.

La 20^{an} de Marto la Francoj, kaptinte monaĥinejon, en ĝi trovis ne sole monaĥinojn sed ankaŭ pli ol tricent ĉiuklasajn virinojn, rifuĝintajn en la preĝejon. Oni agis kontraŭ ili kun multe da respekto kaj zorgo, kaj ilin kondukis al la marŝalo. La kompatindulinoj, ĉiuflanke ĉirkaŭitaj dum kelke da tagoj, ne povis ricevi manĝimejojn de la urbo: ili mortis pro malsano!... La bonkora marŝalo Lannes mem kondukis ilin al la tendara vendejo, kie, alvokinte la soldatnutrajistojn, li ordonis, alporti manĝaĵon por tiuj virinoj. La animgrandeco de l' marŝalo ne limiĝis tiel; ĉiujn li kondukigis al Zaragoza. Kiam ili eniris en la urbon, la loĝantaro, kiu de l' supro de l' tegmentoj kaj sonorilejoj estis sekvinta ilin okule, rapidis al ili, por aŭdi la rakonton pri ilia aventuro. Ĉiuj laŭdegis la marŝalon kaj la francajn soldatojn; tial, tuj de tiu momento kvietigis la ekscitegeco de tiu malfeliĉa loĝantaro, kaj estis decidate, ke oni rezistĉesos. La saman vesperon Zaragoza kapitulacis.

Tradukita de
KAPITANO CAPÉ.



MILITISTAJ MEMORIGAJ FESTOJ.

La historio de la du lastaj monatoj liveras al ni aliajn pruvojn pri la estimo, kiu povas postvivi inter du popoloj momente malamika.

La 2^{an} de Junio okazis en Peks (Fünfkirchen), en Hungarujo, la solena inaŭguracio de monumento starigita je l' honoro de l' soldatoj de la imperia Granda Armeo, pereintaj en la 1806^a jaro pro la pesto, kaj enterigitaj diversloke.

Ĉeestis multaj konataj personoj, inter kiuj reprezentantoj de la franca kaj hungara registaroj, deputitaro de la hungara Ĉambro, reprezentantoj de la armeo, de la franca gazetaro; kaj kelkaj miloj da videmuloj.

Post la kanto *La Marseillaise*, S^{ro} Nikolaso Zsolnay, iniciatinto de la monumento, bonvene salutis la francajn reprezentantojn, kaj oni malkovris la monumenton. Ĝi estas granita obelisko kronita de l' franca aglo.


En sia respondo, farita je l' nomo de l' franca ambasadoro S^{ro} Crozier, malĉeestanta pro malsano, S^{ro} de Fontenay, ĝenerala franca konsulo en Buda-Pesto, laŭde parolis pri la monumento starigita de la hungara nacio, tiel kavalira, aludante la eĥon, kiun trovos en Francujo tiu frateca festo.

Dum prepariĝas tiu numero, okazas en Kanada (19^a-31^a de Julio) la festoj organizitaj pro la tricenta datreveno de l' fondo de Québec (Kebek).

Granda parto de l' sumo voĉdonita de l' Kanada Parlamento por la festoj estas difinita por la aĉeto, kaj aliformigo je publika ĝardeno, de terspaco nomita la « Ebenajoj de Abraham », ĉe l' pordoj de Québec. Sur tiu terangulo, kiu konservis la nomon de simpla ŝipgvidisto, sia posedinto, decidigis la sorto de Kanada kaj la estonto de l' norda Ameriko: tie falis Wolfe kaj Montcalm. Tiu loko, honorigita de l' braveco kaj la morto de ambaŭ kontraŭuloj, iĝos pilgrimejo kaj loko por meditoj. De longe la Angloj kunigis Wolfe kaj Montcalm en sama admireco. En 1827 lordo Dolhouse starigis la faman kolonon, kie kuŝas apude iliaj nomoj. Alia Anglo, lordo Aylmer, gravurigis en 1831, sur la tombo de Montcalm, glorecan enskribon.

Granda parto de la festoj historiaj organizitaj je l' honoro de Québec kaj de Champlain okazos en la ebenajoj de Abraham, kaj denove aŭdiĝos, en sama postmorta gloro, la nomoj de Wolfe kaj Montcalm.

(1) Tiu vundo estis la tria, kaj li estis ricevonta ankoraŭ 9 aliajn. Mirakle la morto preterlasis lin post la batalo de Eylau (8 Feb. 1807).



LA MALNOVA BRUĜO, — LA VERDA KAJO.

Brugo la Vivanta.

La tempo estas pasinta, kiam oni povis nomi Bruĝon *Bruĝo la Mortinta*, kiel faris Georges Rodenbach en sia samnoma romano. Nun la urbo renaskiĝis, kaj ĝia emo al la vivo montriĝis precipe en Julio 1907, kiam oni inaŭguraciis la kanalon, per kiu la urbo denove rilatiĝas kun la maro. Tiun gravan okazintaĵon ni rememorigas hodiaŭ.

Bruĝo, ĉefurbo de la antikva provinco Flandro, estis jam je la XIII^a jarcento la plej granda marhaveno en la mondo.

Mirinde lokita meze de Eŭropo nemalproksime de la maro Norda, kun kiu ĝi komuniĝis per larĝa fluo nomita «Zwijn», ĝi estis elektita de la malnova «Hanza» por fariĝi la ĉefa provizejo. Dum tiuj feliĉaj tempoj, Bruĝo ornamis sin belege.

La geprincoj de la Burgonja familio eksterigis tie sian riĉegecon. Pro tio, kaj ankaŭ pro la multnombraj kanaloj, pontoj kaj palacoj, la urbo estis nomata «Norda Venecio». Tie, la fremdlandaj komercistoj kunvenis kaj elspezis facile. La ĉiulandaj konsuloj konkuris je doma kaj festa lukso.


Ni memoru pri la vortoj elparolitaj de Reĝino Jane de Navarre, kiam ŝi venis en Bruĝon dum 1301: «Mi pensis esti la sola reĝino en Bruĝo, sed mi vidas milon da aliaj ĉirkaŭ mi.»

Tamen, la maro, kiu estis kaŭzinta la riĉecon de la urbo, iom post iom ĝin forlasis. La «Zwijn» enŝlimiĝis, kaj la ŝipoj estis devigataj allandiĝi en Damo, urbeto je kvin kilometroj pli proksime ol Bruĝo de la maro.

Sed la enŝlimiĝo de la «Zwijn» daŭrigis sian progresadon, kaj Damo siavice estis devige forlasita.

Samtempe, la Bruĝanoj ofte batalis, ĉu kontraŭ siaj grafoj kaj sekve kontraŭ la Francaj reĝoj, ĉu kontraŭ la anoj de Gento, k. t. p.

Pro ĉiuj tiuj kaŭzoj, la komercistoj maltrankviligitaj forlasis por ĉiam la Nordan Venecion, kaj iom post iom neforpelegebla funebra atmosfero plenigis la urbon. Ĝia loĝantaro, kiu estis ĉirkaŭe 200000 personoj, malgrandiĝis ĝis 50000, kiu estas la nuna nombro. Tamen Bruĝo restis tiel granda kiel antaŭe, ĝi konservis siajn kanalojn, pontojn, rempar-



LA UNUA ŜIPO (FRANCA VELŜIPO) ENIRANTA EN LA NOVAN INTERNAN BRUĜAN HAVENON.

ojn kaj monumentojn, almenaŭ la plej grandan parton el ili.

Kelkaj preĝejoj kaj palacoj tute malaperis. Tie kreiĝis placoj plantitaj je arboj, kies branĉoj anstataŭis per lignaj ogivoj la ŝtonajn navojn de la preĝejoj. La ĉefsonorilego ĉesigis sian ĉiumeztagan bruegan sonoradon, ĉar ne plu estis necese, sciigi la patrinojn, ke ili endomigu siajn infanojn pro tia rapidiro de la tromultnembraj laboristoj, kiu kaŭzis iafoje infanan mortigon.

Ĉiam juna kaj belsona, restis la fama sonorilaro en la belega urboturo. Ĝi daŭrigis ĝis nune sian ĉiukvaronhoran kanton. Sola ĝi kantas al la nunaj Bruĝanoj la riĉecon kaj fortecon praavajn, kaj rememorigas, ke ilia urbo estis iam la plej potenca, la plej bela en la mondo.

Bela, belega eĉ ĝi estas ankoraŭ nuntempe. La vizitantoj je ĉiu paŝo ĝuas emocidonantajn vidaĵojn.

Promenante ili povas tralegi la tutan grandiozan kaj funebran historion de la malfeliĉa urbo; ili nur penu rigardi ĉirkaŭe.

De proksimume 30 jaroj, nobela bruĝano, S^{ro} Barono de Maere d'Aertrycke, pensis, ke Bruĝo ne estas tute mortinta, kaj li prave diris, ke el ĉiuj kaŭzoj de ĝia malnova riĉeco unu sola malaperis: la komunikigado kun la maro. Tiu kaŭzo, laŭ lia ideo, estis restarigebla.

Tiam li komencis grandan movigadon inter siaj kunurbanoj, parolis, klopodis multe, kaj fine venkis la lastajn ŝanceliĝojn. Ĉiuj Belgoj interesis sin je

tiu vastega patrolanda projekto, kaj fine, dum 1895 la belga parlamento decidis la akcepton de la labora projekto prezentita de inĝenieroj Cousin kaj Coiseau.

Tuj, miloj da laboristoj atakis la teron silentan, kiu kuŝis inter Bruĝo kaj la Norda Maro.


En la norda parto de Bruĝo ili faris vastegan havenon kun bordmarŝejoj ŝtonaj, komercaĵejoj, fervojoj, oficistejoj, elektraj lumfabrikejoj, k. t. p.

Inter tiu haveno kaj la marbordo ili faris kanaligon larĝan je 100 metr. kaj longan 12000 metrojn. Je la fino de tiu kanalo, ŝtona murego longa je 2500 metroj kaj sufiĉe larĝa por subteni fervojojn, stacidomon kaj provizejojn eniĝas en la maron haltigante la okcidentajn ventegajn ondegojn, kontraŭ kiuj ĝi ŝirmas la enirejon de la kanalo. Je la fino de tiu marŝeja murego alta lumturo staras.


Ĉe la enirejo de la kanalo, kolosa kluzo haltigas la akvojn, kiam la maro forfluas, kaj ĉirkaŭ tiuj marbordaj konstruaĵoj, nova urbo nomita Zee-Brugge eliris el la tero kiel magia afero.

La laborejoj rapide antaŭeniris; jam dum Decembro 1905, Bruĝo ricevis viziton de unu el la plej grandaj velŝipoj: la « Cap Horn ». Du jarojn poste la konstruaĵoj maraj estis finitaj, kaj la 1907^a jaro komputos (estos citinda) inter la plej famaj el la Bruĝa historio.


Efektive dum tiu jaro la famaj entreprenistoj Cousin kaj Coiseau anoncanta, ke la Bruĝa marhaveno estas elkonstruita, transdonis ĝin al la



LA KANALO KAJ LA BEGINEJO.



LA SONORILEJO.



LA URBA DOMO.

Bruĝa markonstruaĵa societo, kiu devos valorigi ĝin. Tiu solena okazintaĵo estis akompanata de la tondra moviĝado de la triumfa malnova sonorilego, kies sonoj potencaj supervibris tiujn de ĉiuj aliaj moviĝantaj sonoriloj en la multnombraj turoj de Bruĝo. Multaj festoj ĉiuspecaj ĝojigis la Bruĝanojn.

La Reĝa Moŝto, Leopold II^a, faris solenan eniron sur sia bela vaporŝipo « Alberta », kiu, aperante je la mara murego, kaŭzis kanonan pafadon teran kaj ŝipan, ĉar ŝia Reĝa Moŝto Vilhelmino, reĝino de Holando, sendis tiuokaze tri torpedboatojn komandatajn de oficiro speciale komisiita por saluti reĝon Leopold II^{an} kaj la Belgan popolon. Majeste, la « Alberta » sekvata de la torpedboatoj kaj aliaj ŝipoj eniris la kanalon, kaj alvenis al la Bruĝa haveno, kie miloj da ĉeestantoj, militistoj, kavaleriistoj kaj muzikistaroj aklamis la Reĝon.

Inter la aliaj ĝojigantaĵoj memorigantaj tiun gravan fakton historian ni skribos pri du el ili.

La refaro de la malnova Turniro « Paŝo de la ora arbo » tiel nomita, ĉar la fino de la batalo estis liberigo de grandulo tenata mallibere de malgrandulo sub ora arbo. Tiu Turniro okazis en Bruĝo sur la granda placo, dum la XV^a jarcento.

Sed antaŭ la festa turniro, la popolo, la burĝoj, la magistratoj kaj ankaŭ la fremdlandaj komercistoj loĝantaj en la urbo triumfe kondukis la geregnestruojn kun ilia sekvantaro de ilia palaco nomita « Prinsenhof » ĝis la granda placo por, ke ili ĉeestu la « Paŝo de la ora arbo » organizitan de Antonio de Burĝonjo. En la nuntempa sekvantaro, kiu de kelkaj monatoj tramarŝis la ĉiam malnovajn stratojn, ni rimarkis multajn nobelajn Bruĝanojn de la plej antikva nobeleco. Tre rimarkinda estis la grupo ĉirkaŭ la bela Margarito de York. Tiu ĉi rajdis sur blanka ĉevalo, kaj antaŭe marŝis aro da kantantoj.

Riĉegaj estis la antikvaj vestaĵoj de la sinjorinoj kaj kavaliroj, kaj la plimulto el tiuj ornamaĵoj estis reale faritaj je la Burĝonja periodo. Ni admiris la kavalirojn de la ora ŝaflana ordeno kun ruĝaj

manteloj kaj kapvestoj, sur kiuj briletis la oraj ĉeno kaj ŝafo ornamitaj per brilantoj.

Ni vidis la jenajn nobelojn: Thibau de Neuchatel, Antonio de Burĝonjo, Karolo la Maltimema, Olivier de la Marche, Duko de Clèves, Messire de Saveuse, Messire d'Argeuil, Sire de Comines, de Chassa, k. a. Kiam la sekvantaro alvenis al la Granda Placo, la sonorilaro komencis aŭdigon de malnovaj arioj, kiuj daŭris dum la Turniro.

Belega estis la vidaĵo antaŭ la alta urboturo.


Reale, la rigardantoj povis facile imagi inter tiuj antikvaj monumentoj, aŭdante la malnovajn ariojn ludatajn de la bela sonorilaro, kaj vidante la kostumojn de la Burĝonja periodo, ke ili faras ravan sonĝon.

La alia parto ĉefa de la festa programo estis la ekspozicio, en la bela gotikstila provincoficistejo, de objektoj samtempaj kaj rememorigantaj de la ora ŝaflana ordena epoko (XV^a kaj XVI^a jarc.). Tiu ordeno estas kreita en Bruĝo de Filipo la Bona dum 1429, okaze de lia edziĝo kun Izabelo de Portugal. Ĝi estis nek milita nek religia ordeno, ĝi nur celis grupigi la plej potencajn nobelojn, kaj instigi elmontrojn de luksaj ceremonioj kaj festoj.

Ĝia nomo devenas de la ĉefa komercaĵo Flandra: la lano. La ekspozicio plene sukcesis. Ni rimarkis, ke la reĝoj kaj imperiestroj Angia, Belga, Hispana, kaj Aŭstria estis sendintaj valorajn ornamaĵojn, tapiŝojn, pentraĵojn, monerojn, manskribitajn librojn, k. t. p.

Hispanaj gvardmilitistoj speciale senditaj de lia reĝa Moŝto Alfonso XIII^a zorgadis pri ĉiuj tiuj riĉegaj malnovaj objektoj.

Tie ni admiris famajn pentraĵojn faritajn de Flandranoj Memlink, Van Eyck, Gerard David, Breughel, de nekonataj pentristoj famaj nomitaj « de la duonaj virinaj vizaĝoj » kaj « de Flémalle aŭ de la Meroda familio », de la fama Mabuse (Gossart), k. t. p. Tiuj ĉi pentristoj pentris la tiuepokajn ĉefajn person-



VAPORŝIPO ALTERIĜANTA APUD LA DOKOJ

da progresado ne malhelpos la belegan, artan vidigon de la ĉiama Norda Venezio.

ojn, nome Filipo la Bona, Maximiliano, Karolo la Maltimema, Karolo V^a, k. t. p.

Ni rimarkis, ke multaj el tiuj reĝoj kaj aliaj princoj havis tre malbelan eksteraĵon, precipe Karolo V^a, kies vizaĝo estis tute malbelforma.

Sed, kaj tio estas ĉiama vero, oni ne povas juĝi la realan inteligenton de la homoj laŭ ilia vizaĝo.

La tapiŝoj nomitaj « Gobelins » tre multekostaj senditaj de reĝo Alfonso estis belegaj. Ili montris la militiron de Karolo V^a je Tuniso. Neforgeseblaj vidaĵoj teksitaj de lertegaj manoj laŭ la desegnaĵoj de la desegnisto de la Imperiestro, kiu akompanis la almitistaron dum lia militvojaĝo. Ni vidis ankaŭ famajn orajn ŝaflanajn ĉirkaŭkolojn tute faritajn el oraj ĉeneroj kun la ora ŝafido ornamita per brilantoj kaj apartenantaj al la jam nomitaj reĝoj kaj imperiestro.

Ankaŭ riĉegan mantelon de la Aŭstria imperiestro kun la ŝaflona ordena kapvestaĵo. Bela aro da armaĵoj, statuoj, moneroj, k. t. p.

Finante mian verketon, mi deziras al Bruĝo, dank' al ĝia nova marhaveno, tiel multe da riĉeco kaj viveco kiel dum la ekzisto de la malnova Haveno, sed mi esperas ke tiom

Origine verkita por « Tra la Mondo » de

leŭtenanto VAN WEYENBERGH,

sekretario de la Bruĝa Grupo Esperantista.



« Mektub »

El la alĝeria virina vivado.

Krom senfoliigi jasmemon kaj pisti florfolietojn de rozoj inter siaj apatiaj fingroj, Jamina nenion faris.

Tamen ŝi estis malriĉa kaj, ĝis nun, ŝi iradis laŭ sia ritma irado, helpadis sian maljunan patrinon en ŝiaj hejmaj laboroj nur vestita per vesto el katuno kaj alia vestaĵo, arabe nomita « futa », kvazaŭa ĉemizo, ĉiam malligita.

Tiuj vestaĵoj, apenaŭ sufiĉaj, ne kaŝis la koloron kvazaŭ flaman kaj sukecan de ŝia karno: kaj ŝiaj virinaj formoj aperis firmaj, klasikaj kaj modelaj. L'aŭreolo de ŝiaj haroj, nature blondaj sed kolorigitaj, dismetitaj de la blovo, la dubeblua ĉirkaŭo de ŝiaj grandaj avidaj okuloj, precipe la lumeto, kiu sprucis el ili, igis ŝin stranga kaj enigma kreitaĵo.

Apud ŝi la atmosfero estis parfumata de jasmeno aŭ geranio, kaj alvenis al ni kvazaŭ pleniĝita je amo kaj voluptaĵoj.

Ĝis nun, la vizaĝo de Jamina havis tiun harmonion de la frunto kaj de la okuloj, kiu atestas internan radiadon. Komprenoble ŝia animo kaj ŝiaj ecoj estis ankoraŭ embriaj kaj senmovaj, ĉar Allah (1) kreis por la servuteco kaj la sklaveco ŝian rason, ĉiam kurbiĝantan al la tero por labori, neniam stariĝantan al la ĉielo por pensi. Sed, fine, la radiado de l' rigardo, tiu « fiat lux » de la inteligenteco estis brila, precipe pro la ĝojo, ke ŝi estas bela, ke ŝi estas juna.

Nune la granda alloga potenco, kiu elvenis el ŝi, plu ne ekzistas, ŝi ŝajnas defalinta diaĵo; ŝia rigardo estas vualita de ia ombro; ŝiaj longaj brovoj, ĉiam mallevitaj nune, ne plu havas tiun vivecon, kiu karesis la animon.

Jamina, senmova sur siaj molaj kusenoj ore broditaj, restas tie, nepenetrebla kaj mistera, kiel la sablo de sia dezerto.

De tempo al tempo, skuita de laceco, kiu havas ion sovaĝan, ŝiajn graciegajn brakojn konvulsie ŝi levas super sian kapon, dum el ŝia gorgo eliras sonoj strangaj, kiel la bojo de l' ŝakalo en la soleco.

Anstataŭ sia rido kaj sia ĝojeco, Jamina portas, lutilajn ĉe la lipo, gluitajn ĉe la frunto, ĉe tempioj, sur siaj vangoj, la mentono, orajn brilajetojn kvaronlunformajn.

Etaj bonodorujaj pendas ĉe ŝia kolo, enmiksitaj kun strangaj pendajetoj. Ŝiaj haroj estas en ordo kunligitaj per rubandoj helkoloraj, semitaj je dikaj perlamotaĵoj. Ŝia vesto ne plu estas el katuno, sed el silko argente brodita; ŝia ĉemizo el maldika, nepalpebla gazo, kaj ŝiaj pantofloj, tro grandaj por ŝiaj etaj piedoj, elmontras apud ŝi ŝiajn brilajn oraĵojn.

Ĉio tio, ĉar la araba virgulino baldaŭ edziniĝos je fiera kaj riĉa estro; tial ŝi ne plu laboras. Ŝi okupas sin, nur parfumante sian korpon, ŝmirante ĝin je plej bonaj odorajetoj. Ŝi preparas sin laŭ la mahometana kutimo, por iĝi inda je sia edzo, kiam ŝi transiros lian pordon.

La tutan tagon, ŝiaj kunulinoj, junaj kaj maljunaj, ŝin vizitadas. La maljunaj, pli malpli kurbiĝintaj kaj velkintaj, malŝparas la konsilojn de sia malnova sperto, dum la junaj eltiras el kesteto la pezajn juvelojn ĉizitajn, ilin palpadas, ilin rigardadas per duonenviema okulo. Kaj la tutan tagon, murmuradoj, zumadoj, pepadoj miksitaj kun gorgaj ekkrioj, plenigadas la malgrandan ĉambbron ĉirkaŭitan de kolonareto, poste forflugas eksteren per ĝojaj bruoj.

La preteriranto haltas sciema, kaj aŭskultas momente tiun alfluan kaj defluan de virinaj voĉoj.

Meze de tiu ĝajeco, kial do Jamina estas malgaja? Ja ŝi ne konas sian fianĉon, sed ĉu ŝi ne scias, ke ŝia patrino, post multaj interparoladoj, vendis ŝin altpreze al malŝparema sed malbela maljunulo, al kiu oni laŭdis ŝian juneccon, ŝiajn ĉarmojn, ŝian belecon. Ĉu jam li ne elspzis la duonon de l' monprezo kondiĉita sur la kontrakto, promesante, ke li elpagos la lastan parton, tuj kiam li ne povos plu dubi, ke ŝi estas tiel bela, kiel oni certigis al li.

Sed ne! Jamina estas nek malgaja nek gaja; ŝi estas nur la ilo indiferenta kaj pasiva de la sorto, la ludilo de l' fatalo. Ŝia sorto plenumiĝas.

Tiun ĉi tagon mi estis alveninta ŝian hejmon kune kun kelkaj vizitantinoj, por ŝin gratuli. Ho ve! tiuj pezaj ĉirkaŭkuroj ĉe ŝiaj maleoloj ŝajnis al mi katenajetoj de sklavo; ŝiaj kapjuveloj sur la frunto, la signo de la servuteco; ŝiaj oraĵetoj sur la vangoj, la neforigebla makulo de la groteskeco tra la jarecentoj. Ĉio tio tediis min kiel la esprimo de neyenkebla barbareco. Tiuj juvelujoj hodiaŭ ornamitaj, mi diris al mi, morgaŭ kondukotaj per vipbatoj, neniam estos pretaj por la liberiĝo; neniam alvenos la horo por la virino de Oriento!... kaj sincere mi laŭte ekkompatis ŝin.

Unue ŝi ridetis, poste refariĝis serioza, kaj levante sian dekstran manon ŝarĝitan je pezaj metalajetoj, ŝi respondis grave: « Mektub Rebbi », Dio tion volas.

De A. BAISSAC,
el Konstantino (Alĝerio).

(1) Araba nomo de Dio.

Edziĝa Propono

Unuakta Ŝerco, de A. ĈEĤOV. Traduko de ROMANO FRENKEL (Rusuĵo).

PERSONOJ (1):

Stepán Stepánoviĉ ĈUBUKÓV, bienulo.
Natalja Stepánovna, lia filino 25-jara.

Ivan Vasiljeviĉ ZÓMOV, najbaro de Ĉubukóv, sana,
fortika, bonenutrita, sed tre malsantimema bienulo.

Gastoĉambro en la biendomo de ĈUBUKOV.

I.

ĈUBUKOV kaj ZOMOV (kiu eniras, en frako kaj en blankaj gantoj).

ĈUBUKOV (2) (*irante renkonte al li*). — Karulineto, kion mi vidas! Ivan Vasiljeviĉ! Mi estas tre ĝoja! (*Li prenas lian manon*). Jen ĝuste surprizo, panjeto! Kiel vi fartas?

ZOMOV. — Mi dankas vin. Sed vi mem, kiel farti bonvolas?

ĈUBUKOV. — Ni vivetas, anĝelo mia, dank' al viaj preĝoj kaj tiel plu (3). Sidigu, mi petas humile.... Jen ĝuste ne bone estas la najbarojn forgesi, panjeto mia. Karulineto mia, sed kial vi estas tiel oficiale? En frako, en gantoj kaj tiel plu. Ĉu vi veturas ien, karegulo mia?

ZOMOV. — Ne, mi venis nur al vi, estimata Stepan Stepaniĉ.

ĈUBUKOV. — Do kial en frako, mia ĉarmo? Ĝuste kvazaŭ por la novjara vizito!

ZOMOV. — Jen vidu, pri kio l' afero (*li prenas lin sub la brakoj*). Mi alveturis al vi, estimata Stepan Stepaniĉ, por malkvietigi vin per unu peto. Neunufoje mi jam havis la honoron, min turni al vi por helpo, kaj ĉiam vi, tiel dire.... sed mi, pardonu, mi estas ekscitita. Mi trinkos da akvo, estimata Stepan Stepaniĉ (*Li trinkas akvon*).

ĈUBUKOV (*al si*). — Por peti monon, li venis! Mi ne donos! (*al li*) Pri kio l' afero, belulo?

ZOMOV. — Jen vidu, Estiman Stepaniĉ... pardonu, Stepan Estimiĉ... tio estas... mi terure ekscitiĝas, kiel vi vidi bonvolas... Unuvorte, nur sole vi povas helpi al mi, kvankam mi neniel meritis kaj... kaj ne havas la rajon en esperi vian helpon...

ĈUBUKOV. — Ha, do ne frazu, panjeto! Diru per unu fojo. Nu?

ZOMOV. — Tuj... tujmomente. La afero koncernas tion, ke mi alveturis por peti la manon de via filino Natalja Stepanovna.

ĈUBUKOV (*ĝoje*). — Panjonjo! Ivan Vasiljeviĉ! Ripetu ankoraŭ unu fojon, — mi ne bone aŭdis!

ZOMOV. — Mi havas la honoron peti...

ĈUBUKOV (*interrompante*). Karulino mia... Mi estas tiel ĝoja kaj tiel plu... Jen ĝuste kaj al tio simile (*lin ĉirkaŭprenas kaj kisas*), de longe mi deziris. Tio ĉi estis mia ĉiama deziro (*li ellasas larmon*). Kaj ĉiam mi amis vin, anĝelo mia, kiel propran filon. Donu Dio al vi ambaŭ konsenton kaj amon kaj tiel plu, kaj mi tre deziris. Kial do mi staras, kvazaŭ

idioto? Mi tute malprudentiĝis de ĝojo, tute malprudentiĝis! Ho, mi per mia tuta animo... Mi iros, mi vokos Natanjon, kaj al tio similan.

ZOMOV (*kortuŝita*). — Estimata Stepan Stepaniĉ, kiel vi opinias? Ĉu mi povas esperi ŝian konsenton?

ĈUBUKOV. — Tia, jen ĝuste, belulo kaj... kaj ŝi ne konsentus? Enamiĝinta ŝi estas sendube, kiel katino, kaj tiel plu... Tuj! (*li foriras*).

II.

ZOMOV (sola).

ZOMOV. — Mi sentas malvarmon... Mi tuta tremas, kvazaŭ antaŭ ekzameno... Ĉefe oni devas ekkapti kuragon kaj agi decide. Se oni ŝanceliĝos, multe parolos, kaj atendados idealan aŭ veran amon, tiamaniere oni neniam edziĝos... Brr!... Estas malvarme! Natalja Stepanovna estas bonega mastrino, ne malbela... kion do mi ankoraŭ bezonas? Tamen, pro la ekscitiĝo, en miaj oreloj komenciĝas brueto (*li trinkas akvon*). Kaj ne edziĝi mi ne povas... Unue mi estas jam 35-jara, aĝo tiel dire kriza. Mi havas kormalsanon, ĉiamajn korbatojn, mi estas kolerema, kaj mi ĉiam terure ekscitiĝas... Jen nun miaj lipoj tremas kaj mian dekstran palpebron konvulsieto saltetiĝas... Sed la plej terura ĉe mi estas la dormo. Apenaŭ mi estas enlitiĝinta, apenaŭ mi komencas endormiĝi, tuj, subite, en la maldekstra flanko de mia korpo io—tir! kaj frapas rekte en la ŝultron kaj en la kapon.. Mi elsaltas kiel frenezulo, marŝas iom kaj denove kuŝiĝas, sed apenaŭ mi ekdormas, kiam en mia flanko denove — tir! Kaj tiel dudek fojojn...

III.

NATALJA STEPANOVNA kaj ZOMOV.

NATALJA STEPANOVNA (*eniras*). — Nu, jen! Tio estas vi, kaj paĉjo diris: tien ĉi venis komercisto por preni la komercaĵon. Bonan tagon, Ivan Vasiljeviĉ!

ZOMOV. — Bonan tagon, estimata Natalja Stepanovna!

NATALJA STEPANOVNA. — Pardonu, mi surhavas antaŭtukon, kaj mi estas en negliĝa vesto... Ni senŝeligas pizetojn por sekigo. Kial vi de tiel longe ne vizitadis nin? Sidigu (*ili sidigas*). Ĉu vi deziras matenmanĝi?

ZOMOV. — Ne, mi dankas vin, mi jam manĝis.

NATALJA STEPANOVNA. — Fumu, mi petas... Jen es-

(1) Ni montris unufoje per vokaloj akcentitaj la rusan akcenton en la rusaj propraj nomoj. — (2) Ĉubukov havas strangan kulimion nomi virojn per virinaj karesantaj epitetoj: krom tio li ankaŭ uzas ĉe duoblekaresantaj epitetojn; ekzemple: panjonjo. — (3) Ĉubukov trouzas la esprimojn: «jen ĝuste» «al tio simila» «kaj tiel plu» sen ia rilato al sia parolo. Rim. de l' tradukinto.

tas alumetoj... La vetero estas bonega, sed hieraŭ estis tia pluvo, ke la laboristoj nenion faris. Kiom da fojnamasoj vi defalĉis? Mi, imagu, estis tro avida, kaj defalĉis la tutan herbejon, sed nun mi jam bedaŭras, mi timas, ke mia fojno putriĝos. Estus estinte, pli bone iom atendi! Sed kion tio signifas? Ŝajnas, ke vi surhavas frakon? Jen estas novaĵo! Ĉu vi veturas al balo, ĉu ne? Ĉiokaze, vi fariĝis pli bela... Verdire, kial vi venis tiel dande?

ZOMOV (*ekscitite*). — Jen aŭskultu, estimata Natalja Stepanovna, estas konate, ke mi jam de longe, de l' infaneco mem, havas la honoron koni vian familion. Mia mortinta onklino kaj ŝia edzo, de kiuj, kiel vi bonvolas scii, mi ricevis herede la bienon, ĉiam profunde estimis vian patreton kaj vian mortintan patrineton. La familio de Zomov'oj kaj la familio de Ĉubukov'oj vivis ĉiam en la plej amikaj kaj, oni eĉ povas diri, en parencaj interrilatoj. Krom tio, kiel vi scii bonvolas, mia bientoero en multaj lokoj apudestas la vian. Se vi bonvolos ekrememori, miaj «Bovaj Herbejoj» estas samlimaj kun via betularbareto.

NATALJA STEPANOVNA. — Pardonu, mi vin interrompas. Vi diras: «*miaj Bovaj Herbejoj*». Ĉu ili estas viaj?

ZOMOV. — Jes, miaj...

NATALJA STEPANOVNA. — Jen ankoraŭ! La «Bovaj Herbejoj» estas niaj, sed ne viaj!

ZOMOV. — Ne-do, miaj, estimata Natalja Stepanovna.

NATALJA STEPANOVNA. — Tio estas por mi novaĵo. De kie do ili estas viaj?

ZOMOV. — Kiel de kie? Mi parolas pri tiuj «Bovaj Herbejoj», kiuj kojne eniĝas inter via betularbareto kaj la Brulinta marĉo.

NATALJA STEPANOVNA. — Nu, jes, jes... Ili estas niaj...

ZOMOV. — Ne, vi eraras, estimata Natalja Stepanovna — ili estas miaj.

NATALJA STEPANOVNA. — Rekonsciiĝu, Ivan Vasiljeviĉ. De kia tempo ili fariĝis viaj?

ZOMOV. — De kia tempo? De kiam mi min memoras, ili estis ĉiam miaj.

NATALJA STEPANOVNA. — Nu, koncerne tion, mi petas kompleze pardonon!

ZOMOV. — Oni tion vidas el la dokumentoj, estimata Natalja Stepanovna. La «Bovaj Herbejoj» estis iam pridisputataj, tio estas vera, sed nun ĉiuj scias, ke ili estas miaj. Kaj ĉiu disputo pri tio estas superflua. Bonvolu pripensi: la avino de mia onklino fordonis tiujn Herbejojn por senlima kaj senpaga uzado al la vilaĝanoj de la avo de via patreto, pro tio, ke ili fajrumis por ŝi brikojn. La vilaĝanoj de la avo de via patreto uzadis la Herbejojn ĉirkaŭ kvardek jarojn, kaj alkiutimiĝis, konsideri ilin kiel sian proprajn sed poste, kiam estis publikigita la decido...

NATALJA STEPANOVNA. — Estis tute ne tiel, kiel vi rakontas! kaj mia avo, kaj mia praavo, konsideradis, ke ilia tero sin etendas ĝis la Brulinta marĉo — sekve la «Bovaj Herbejoj» estas niaj. Kial do disputi pri tio? — mi ne komprenas. — Eĉ ĉagreno min kaptas!

ZOMOV. — Mi montros al vi la dokumenton, Natalja Stepanovna!

NATALJA STEPANOVNA. — Ne, vi simple faras ŝerc-

ojn aŭ incitas min... kia surprizo! Ni posedas la teron de preskaŭ tricent jaroj, kaj subite oni anoncas al mi, ke la tero ne apartenas al ni! Ivan Vasiljeviĉ, pardonu, sed mi eĉ ne kredas al miaj propraj oreloj... Ili ne multon valoras por mi, tiuj Herbejoj! Tie estas nur kvin desjatinaj (1) kaj ili kostas nur iajn tricent rublojn, sed min indignigas la maljusteco. Diru kion vi volas, sed la maljustecon mi ne toleras.

ZOMOV. — Elaŭskultu min, mi petegas vin! La vilaĝanoj de la avo de via patreto, kiel mi jam havis la honoron diri al vi, fajrumis brikojn por la avino de mia onklino. La onklina avino, dezirante fari al ili agrablajn...

NATALJA STEPANOVNA. — Avo, avino, onklino... nenion mi komprenas el tio! La Herbejoj estas niaj, jen ĉio!

ZOMOV. — Miaj-do!

NATALJA STEPANOVNA. — Niaj! Eĉ du tagojn pruvadu, eĉ du frakojn surmetu, tamen ili estas niaj!... Nenion vian mi deziras, sed ankaŭ la mian perdi mi ne volas... Kiel ajn tio plaĉus al vi!

ZOMOV. — La Herbejojn mi ne bezonas, sed nur pro la principo mi parolas. Se plaĉos al vi, estu tiel, mi ilin donacos al vi.

NATALJA STEPANOVNA. — Mi mem povas ilin donaci al vi, ili estas miaj!... Ĉio tio ĉi estas en la plej ĝusta senco almenaŭ stranga, Ivan Vasiljeviĉ! Ĝis nun ni konsideradis vin kiel bonan najbaron, amikon; en la pasinta jaro ni donis al vi nian draŝmaŝinon, kaj dank' al tio ni devis findraŝi nian grenon dum Novembro, kaj vi agas kontraŭ ni kvazaŭ kontraŭ iaj ciganoj. Vi donacos al mi mian propran teron. Laŭ mi, tio ĉi estas eĉ aroganteco, se vi volas...

ZOMOV. — El viaj vortoj sekvas, do, ke mi estas uzurpulo? Fraŭlino, neniam mi uzurpadis malpropran teron, kaj kulpigi min pro tio, mi ne permesos... (*li iras rapide al la karafo kaj trinkas akvon*). La «Bovaj Herbejoj» estas miaj!

NATALJA STEPANOVNA. — Malvero! Niaj!

ZOMOV. — Miaj!

NATALJA STEPANOVNA. — Malvero! Mi pruvos al vi! Jam hodiaŭ mi sendos miajn falĉistojn al tiuj ĉi herbejoj!

ZOMOV. — Kion vi diras?

NATALJA STEPANOVNA. — Hodiaŭ tie estos miaj falĉistoj!

ZOMOV. — Kaj de mi ili ricevos sur la kolon!

NATALJA STEPANOVNA. — Vi ne havas la rajton!

ZOMOV (*ekkaptas sin ĉe la koro*). — La «Bovaj Herbejoj» estas miaj! Ĉu vi komprenas? Miaj!

NATALJA STEPANOVNA. — Ne krii, mi petas! Vi povas krii kaj raŭki de kolero en via hejmo, sed, tie ĉi, mi petas, tenu vin en la limoj!

ZOMOV. — Se, fraŭlino, pro tiu terura, suferiga korbatado, se la vejnoj ne frapus en la tempioj, mi parolus kun vi alie! (*Li krias*). La «Bovaj Herbejoj» estas miaj!

NATALJA STEPANOVNA. — Niaj!

ZOMOV. — Miaj!

NATALJA STEPANOVNA. — Niaj!

ZOMOV. — Miaj!

(*Dairigota*).

Tradukita de ROMANO FRENKEL.

(1) Desjatinaj = 1,0925 de hektaro.

Richard Jefferies.

de J. C. SNAPE (Anglujo).

Antaŭ kvindek jaroj, en modesta farmodomo, apud Swindon en Wiltshire, Anglujo, loĝis revema knabeto. De siaj unuaj jaroj li amis vagadi sur la kamparo, observante kaj memorante ĉiun birdon kaj beston — jen admirante la delikatan verdon de la printempa saliko, jen rave aŭskultante la kanton de l' alaŭdo, kiam ĝi altiĝas en la ĉielo. Tutajn tagojn li pasigis kuŝante sur riverbordo, kie, la kapo kuŝita post tufo el herbo, li rigardadis la vivon de l' fiŝoj. Kun la farmlaboristoj li ellernis la farmvivon; li akompanis la sportistojn, kaj iĝis lerta pafisto kaj fiŝkaptisto. La amo al la kampara vivado lin penetris, amo kiu neniam lin forlasis.

Multaj sentas tiun amon al la naturo. Al kelkaj ĝi nur donas pluan plezuron dum okaza promeno ekster la urbo: el aliaj ĝi faras sportistojn, kiuj montras sian amon per la mortigo de la malfeliĉaj bestoj, kies beleco gloras la pejzaĝon. Sed el kelkaj maloftaj naturoj, la amo al la naturo faras artistojn, verkantajn per kraĵono kaj plumo, kiel Millet, Shoreau, Burroughs kaj Jefferies.

Kiam, ankoraŭ tre juna, Jefferies komencis skribi siajn pensojn pri la vidaĵoj de sia taga vivo, kaj kiam li forlasis la lernejon, li iĝis raportisto ĉe la North Wilts Herald, en 1866. En tiu metio li laboris dum dek unu aŭ dek du jaroj, dum kiuj li verkis kelkajn rememorindajn novelojn. En novembro 1872, li verkis longan artikolon por la «Times» pri skribantan la vivadon de la Wiltshire farmlaboristoj, per kiu li tuj konatiĝis, kaj kiu malfermis por li la paĝojn de la revuoj. Dum kelke da jaroj, li verkis oftajn artikolojn en la revuoj, kaj fine, en 1877, li forlasis sian ĵurnalon por iri al Londono. Dum la sekvanta jaro li ricevis sian sukceson gravan per libro: «La Hejmo de la Ĉasgardisto aŭ Skizoj pri la Naturscienco kaj la Kampara Vivado.» Poste venis aliaj libroj pri similaj temoj: «Besta vivo en Suda Graflando» (1879), «Arbara Magio» (1881), «La Vivo de la Kamparano» (1884) kaj aliaj. Unu libro, «La Historio de mia koro» (1883) estas stranga, mistera rakonto pri lia interna vivo kaj religio. «Bevis» (1882) pridiras liajn memorojn de knabeco en Wiltshire. Li mortis en 1887, post ses jaroj da dolora malsano. Lia lasta verko, «Amarillis ĉe la Foiro» estas nur duone finita.

La nomo de Richard Jefferies ne vivos nur pro lia lerteco kiel natursciencisto, nek pro la ĉarmo de liaj priskribaj verkoj. Estas la amo al ĉiu objekto en la naturo, la amo kiu regis en lia animo, kiu ĉiam memorigos pri li. Malriĉa, malsana, ĉiam la naturo povis lin ĝojigi. Li diras en «La Roso Matena». — «Estas momento kiam la tero estas tiel bela, ke la malĝojo ŝajnas nur sono. Ne povas esti — ne estas reala, ĉi tiu bedaŭro; ni ĝin imagis, aŭ certe la suno ne brilis, la akvo ne tiel briletus. Al la beleco, la malĝojo estas nekonata; ĝi ne estas en ĝia sfero; ĉu pro ĉi tio ni instinkte ŝategas la belecon?»

La riĉecon li ne demandis; sufiĉis al li: «Esti!

» Vivi! Havi ĝuegon ĉe ĉiu enspiro; ĉe ĉiu korbato; ĉe ĉiu movo de l' membroj; en ĉiu sento! ». El la vivo de la kampoj li eltriris la saman feliĉon. Li skribis: «La birdoj scias kaj sentas la diferencojn de la sezonoj tiom, kiom ni. Ĉiu certe observis ilian ĝojemon dum la printempo; ili estas kvietaj; sed tre, tre okupataj meze de l' somero; kiam la aŭtuno alvenas, ili videble ĝojas dum la okazaj horoj de varmece. La postsignoj de iliaj piedetoj estas preskaŭ sanktaj; — tie estas ĝoja vivo — ne ilin detruu. Estus tiel ĝoje scii, ke io estus feliĉa.» (Ekster Londono).

Ne sole li konis kaj amis la bestojn kaj birdojn, la arbojn kaj riveretojn de la kamparo; neniu iam plibone priskribis sian homan vivadon. En «Amarillis ĉe la Foiro» estas kelkaj karakteroj pentritaj per majstra mano. La heroino estas ĉarma portreto de burĝonanta virino; ŝia patro, John Eden, ĉiam laboranta sed ĉiam malriĉa, kiu pretekstas dormeti post la tagmanĝo, por vidi la musojn, kiuj venas por manĝi la panerojn falintajn sur lian vestaĵon; la vagabonda artisto, Alere Flamma, la farmastrino, Mrs Eden — ĉiuj estas tiel lerte kiel fidele priskribitaj. Tio nur estas unu el liaj libroj, kaj en liaj aliaj oni trovas tutan galerion da tipoj — la Ĉasgardisto, la Plugisto, la Bienulo — ĉiuj preparolitaj per la sama scio kaj simpatio.

Sed ĉiujn li devis forlasi, unue por perlabori la vivilon en Londono, kaj, antaŭ ne longe, ĉar lia mallonga vivo finiĝis, li devis adiaŭi siajn tiel amitajn kampojn. Jen kiel li bedaŭris la venontan disigon: «Mi revas pri tio, kion ili ĉiuj faros sen mi; kiel ili faros sen mi, kiu zorgis la kalendaron por ili. Ĉar mi observis ĝin tiel zorge kaj ame, tagon post tago; — la semfolioj sur la montetoj en la lokoj ŝirmitaj kontraŭ la vento, la supreniĝo de la juna herbajo, la seka leondento (1), la ĉevalpiedo (2) sur la pezaj, dikaj terpecumoj, la piedpremegita kokidumo (3) malŝatata apud la kampopordo, tiel ofta kaj malgranda, tamen tiel kara al mi. Ĉiu herbero estis mia, kvazaŭ mi estus ĝin aparte kulturinta. Ĉiuj estas miaj amatoj, kiel la rozoj, kiujn tiu, kiu amas sian ĝardenon, tiel fidele zorgas».

Eltiraĵo el «La Hejmo de l' Ĉasgardisto»

de RICHARD JEFFERIES.

Tre ofte, kiam vi staras en herbeja vojporo iom kaŝata per la arbetoj, rigardante la pegon sur la formikejoj, kies ovojn la perdrikoj ankaŭ amegas, (pro tio bona formika jaro, dum kiu la formikoj estis multidaj, havas ankaŭ multe da perdrikoj) vi povas aŭdi, se kviete vi restas, mallaŭtan froteton en la plektobarilo, kaj post ne longe elrampos vizeto (4); vidante vin, li ekhaltas, levas la kapon, kaj vin ne ŝanceliĝe rigardadas: nur movu la okulojn, kaj li ree kuŝiĝas en la plektobarilo; restu senmove, an-

(1) Leondento. Angl.: Dandelion; Fr.: Dent-de-lion; Germ.: Löwenzahn. — (2) Ĉevalpiedo. Angl.: Colltfoot; Fr.: Tussilage, pas-d'âne; Ger.: Haseltalg. — (3) Kokidumo. Angl.: Chickweed; Fr.: Morgeline, mouron blanc; Germ.: Hühnerdarm. — (4) Angl.: Wensel; Fr.: Belette; Germ.: Wiesel. — Ankaŭ nomata mustelo.

koraŭ rigardante antaŭen, kvazaŭ vi nenion vidus, kaj li baldaŭ rekuraĝiĝos, kaj eĉ transiros la voj-
pordon preskaŭ sub viaj piedoj.

Jen la sekreto de l' bestobservado: senmoveco, silento kaj ŝajna senintereseco. Laŭ ia instinkta metodo ĉi tiuj sovaĝaj estaĵoj lernas distingi, ĉu oni rigardas ilin amike aŭ male; kaj, se tute proksime estas la okulo, kiu ilin observas. Dum vi observas ilin kvazaŭ per la angulo de la okulo (flanke) aŭ rigardas super iliaj kapoj estas bone. Rigardu ilin plenvizaĝe, kaj ili foriros.

Kiam oni atendas kun pafilo en seka defluilo, dum varma posttagmezo somera, ĝis alvenos kuniklo, foje bunĉjo (1) ekaperas en la buŝo de subtervojo, kiu preskaŭ tuŝas la genuo. Ĝi ekhaltas, kvazaŭ ŝtoniĝinte pro miro, kaj sidas sur la koksoj. Ĝia okulo bruna, larĝe malfermita, restas al vi kun scivol-
ema rigardo: ĝiaj naztruoj moviĝadas kvazaŭ ĝi enflarus; ĝiaj vangharoj moviĝadas; intermite ĝi frapas la teron per la postaj piedoj kun nelaiŭta, malsonora bruo. Tio ĉi kompreneble estas signo de timo, je kies bruo ĉiuj kunikloj ĝin aŭdantaj tuj malaperas en la kuniklejon. Tamen via amiko sidadas kaj rigardadas vin kvazaŭ ensorĉite. Rigardadu folieron de la filiko kuŝanta preter ĝi, kaj ĝi restados. Je la momento, kiam via okulo renkontos ĝian, aŭ via fingreto movetiĝos, ĝi malaperos per eksalto.

Tiel ankaŭ okazas je la birdoj. Transiru herbejon svingante bastonon, eĉ kantante, kaj la frugilegoj kviete daŭrigos sian serĉadon de tervermetoj, kvankam nur tridek metrojn malproksime: haltu por ilin rigardi, kaj tuj ili forflugas. Tiel agas ankaŭ la fringoj apud la vojo. La vojiranto povas marŝi sub la branĉo sur kiu ili kantas, se li paŝas sen videbla interesiĝo; se li ekhaltas por aŭskulti, iliaj flugiloj ekbrilas per la sunlumo, ĉar ili ekflugas.

La herbejoj kondukas al la bordoj de l' laĝeto, kaj la plej proksimaj kampoj unuiĝas preskaŭ nevid-

eble kun la verda marĝeno de l' akvo, tiel ke ĉe la rando ĝi estas tiel plena je kanoj kaj malbonaj herboj, ke el malproksime oni apenaŭ povas ĝin distingi inter la herbajo. Kiam ni alproksimiĝas, la kukolo kantas, dum ĝi pasas super niaj kapoj. « Ĝi krias flugante », estas la ofta kampara diro.

Antaŭe mi imagis, ke la kukolo ŝatas eĉon, rimarkinte, ke ia arbareto apud laĝeto, kies kontraŭa bordo resendis klarsonan respondon, estis ŝatata loĝejo de tiu birdo. La ripetado de la fluidaj notoj dum ili iris kaj revenis estis strange agrabla, sendube pro pleneco kaj harmonieco al ĝia kanto pruntedonitaj de la akvo aganta kiel resonigilo. Ĝi eble imagis, ke alia birdo respondas; certe « kriadis » multe pli longe tie, ol en aliaj lokoj. Matenon post mateno, je preskaŭ la sama horo — je la dek unua — kukolo kantis en tiu arbareto, pro tio eble mi kredis, ke la kukolo, kvankam ŝajne senĉese vagadante, reale havas pli da metodo kaj reguleco en siaj kutimoj, ol ŝajnas.

Kamparanoj pretendas, ke la kukoloj malplioftiĝas ĉiun jaron, kaj ne alvenas tiel multenombre kiel antaŭe; kaj ĉu pro malfavoraj sezonoj, ĉu pro aliaj kaŭzoj, tio certe estas vera pri kelkaj lokoj; mi memoras, ke mi aŭdis ĝis kvar, kune en granda ulmo — arbo kiun ili amas —; ĉiuj kriis samtempe; tio okazis antaŭ kelke da jaroj, kaj nun tiu kvartalo enhavas multe malpli da ĉi tiuj birdoj.

Estis superstiĉo, laŭ kiu oni restos la tutan jaron en la loko aŭ la stato en kiu oni aŭdas la kukolon en la printempo. Pro tio estas malsance ĝin unuafoje aŭdi en la lito, ĉar tio okazigos longan malsanecon. Tio ĉi, pasante, estis agrabla fabelo, elpensita por liteligi la melkistinojn frumatene. »

*Laŭ la originalo en angla lingvo,
tradukita de J. C. SHAPE, (Anglujo).*

(1) *Angl.: Bunny. Nomo kiun la infanoj donas al la kuniklo.*



Enketo pri Diversnaciaj infanaj Ludoj.

(Popolaj, familiaj kaj lernejoj).



BABKI LUDO.

« BABKI ».

Rusa popola infana ludo.

Sur la kopio de la pentraĵo de l' fama rusa pentristo V. E. Makovskij oni vidas kvin vilaĝajn infanojn ludantajn « Babki ». Por tiu originala ludo, treege amata ĉie en Ruslando de la infanoj kaj, en la vilaĝoj, eĉ de plenaĝuloj, oni bezonas, ke ĉiuj kunludantoj alportu sufiĉe da bovaj falangostetoj, kiujn la rusoj nomas « Babki ». Jen unu el la ludmanieroj:

Oni starigas vicon da babkoj; ĉiu kunludanto povas starigi en tiun ĉi vicon el sia provizo tiom da ostetoj, kiom li volas; por ĉiuj du starigitaj babkoj li ricevas la rajton fari unu ĵetebaton por faligi, de interspaco de kelke da paŝoj, kiel eble plej multe da babkoj, kiuj fariĝos lia propraĵo.

Kiel ĵetaĵon oni uzas ordinaro unu el siaj ostetoj, plenigitan interne je plumbo.

Antaŭ ol komenci la ludon, ĉiuj ĵetas siajn ĵetostetojn — kaj laŭ la kuŝ- aŭ starmaniero de falintaj ĵetostoj oni difinas la vicordon de la ĵetontoj; kompreneble ĉiu penas esti la unua, ĉar la unua havas antaŭ si la tutan brave starantan vicon da babkoj tute ne tuŝitan. Kiam iu malfeliĉa mallertulo malgajnas ĉiujn siajn babkojn, li devas aĉeti novan provizon da ili ĉu de la feliĉuloj-gajnintoj, ĉu havigi ĝin al si alimaniere. Sekve la ludo estas monperda (1).

ROMANO FRENKEL.

(1) *La babkoj kostas: unu ĝis kvin kopekoj (spesdekoj) la deko; la prezo ofte ŝanĝiĝas sur la buba borso.*

MIKSAJ JOJ.

Ni donas ĉi poste la temojn de la du enketoj, pri kiuj ni parolis en niaj antaŭaj numeroj, petante niajn kunfratojn por afabla diskonigo de tiuj enketoj.

ENKETO PRI LA POPOLAJ PAROLMANIEROJ.

Interesa interŝanĝo de leteroj kun nia distinginda samideano, ĉefingenero Rollet de Lille naskis la ĉi suban enketon, pri kiu ni altiregas la atenton de niaj legantoj. Kiel ni jam skribis, tiu enketo povos efike partopreni en la pliriĉigo de nia lingvo, precipe se niaj kunfratoj bonvolos nin helpi, montrante al siaj legantoj ĝiajn intereson kaj partoprenindecon.

Tion ĉi dirinte, ni konigas la celon de la enketo.

La popolaj parolmanieroj ebligas pli certe kaj pli facile ol io ajn, kompreni la spiriton de iu nacio. Estus do tre interese kompari la diversajn naciajn esprimojn, per kiuj en la diversaj landoj, la popolo formulas la plej komunajn ideojn.

Nia lingvo estas aparte tute taŭga por tiu studo, ĉar, estante logika, ĝi tradukos akurate tiujn naciismojn.

Aliparte estas utile koni, kiamaniere oni esprimas en diversaj naciaj lingvoj, la naciismojn de iu el ili, ĉar se okazas, ke iu el tiuj parolmanieroj estas la sama en kelkaj aliaj lingvoj, eble ĝin, estantan internacia, oni povos enkonduki en Esperanton kaj tiamaniere krei esperantismojn, kiuj, estante internaciaj, ne estos idiotismoj, kaj pligrandigos la ĉarmon de nia lingvo.

Ni donas tie ĉi sube kelkajn francajn popolajn parolmanierojn; sur la unua linio (F), troviĝas la franca esprimo esperantigita laŭvorte kaj, sur la dua (S), ĝia signifo.

Ni petas niajn nefrancajn legantojn, sendi al ni la esprimojn, kiujn la popolo uzas en ilia lando, por formuli la samajn ideojn. Sufiĉos, ke ili skribu la esprimon — evidente esperantigitan laŭvorte — kune kun la numero al kiu ĝi rilatas.

Ni ankaŭ petas ĉiujn niajn legantojn, adresi al ni la popolajn esprimojn de ilia lando, (esperantigitajn laŭvorte kaj kunigitajn kun ilia signifo). Ni presigos ilin por daŭrigi tiun enketon, se ĝi ŝajnas interesa.

Francaj popolaj parolmanieroj.

1. F — Dormi sur ambaŭ oreloj.
S — Esti tute trankvila pri la okazontaĵoj.
2. F — Dormi nur per unu okulo.
S — Ŝajnante tute trankvila, tamen atenti pri la okazontaĵoj.
3. F — Havi fojnon en siaj botoj.
S — Esti riĉa.
4. F — Ne alligi sian hundon per kolbasetoj.
S — Esti avara.
5. F — Preni siajn kruojn kun sia kolo.
S — Forkuri.
6. F — Rompi sian pipon.
S — Morti.
7. F — Pisti malblankaĵon.
S — Malĝojegadi.
8. F — Enlokigi plugilon antaŭ bovoj.
S — Verki ion komencante per la fino.
9. F — Forĵeti la tenilon post la hakilo.
S — Tute malesperi.
10. F — Riski ĉion por ĉio.
S — Riski ĉiujn gajnaĵojn samtempe.
11. F — Troviĝi en la fino de sia rulo.
S — Esti farinta ĉion, kion oni povas fari.
12. F — Ne havi malvarmon je la okuloj.
S — Esti malrimema.
13. F — Koni iun nek de Eŭo nek de Adamo.
S — Tutĉe ne koni iun.
14. F — Foriri ne petante pri sia restaĵo.
S — Foriri ne dirante eĉ unu vorton.
15. F — Mortigi tempon.
S — Okupigi per io ne interesa, por pasigi tempon.
16. F — Malplenigi la fundon de sia sako.
S — Rakonti ĉion, kion oni scias.

Oni sendu la respondojn ĉe S^{ro} Rollet de l'Isle, 35 rue du Sommerard, Paris (Francujo).

Jen la 2a enketo.

LA MORALECO EN LA STRATOJ KAJ PUBLIKAJ LOKOJ: LA BATALADO ANTIPORNOGRAFIA.

DETALEJO.

A. — Ĉu ekzistas en via lando *leĝoj* kontraŭ la pornografio? Ĉefaj artikoloj; punoj.

B. — Ĉu ekzistas en via lando aŭ urbo *societoj* celantaj tiun ĉi kontraŭbatalon? Per kiaj rimedoj ili agadas. Rezultatoj atingitaj

C. — Kia estas la rolo ludebla de la *privatuloj*? Ekzemple: ĉu ili povas denunci kulpojn? Ĉu ili uzas sian rajton?

D. — Kion vi proponas por ebla *Organizo internacia kontraŭ la pornografio* (O.I.K.P.)? t. e. la eldono, la importo, la vendo, la elmondo de poŝtaj kartoj, bildoj, ĵurnaloj, libroj celantaj nek la arton, nek la sciencon, nek la literaturon, sed la ekspluaton de nemoralaj inklinoj precipe ĉe la junularo; t. e. ankaŭ prezentadoj, kinematografoj kaj ĉiuspecaj vidaĵoj *pornografijaj*.

E. — Kion vi proponas por kuraĝigi la aŭtorojn, verkistojn, eldonistojn, komercistojn, artistojn... kiuj respektas la moralon kaj estas tamen veraj amikoj de l' arto vualita aŭ ne.

Oni sendu la respondojn al S^{ro} Durieux, Direktoro de la Lernejo Montesquieu, rue de Bouvines, Lille (Nord), Francujo.

BIBLIOGRAFIO.

« **Tra la Filatelio** ». Internacia kaj ĉiumonata ĵurnalo, celanta interrilatigi la ĉiulandajn kolektantojn de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. La nova organo bonege prezentas sin, kaj — aliparte — estas tute korekte kaj facilstile verkita. Estas vere, ke la ĉefredaktoro estas nia distinginda kunlaborantino F^{ino} Flourens, kaj mi kredas, ke ankaŭ Koksano donos plenan liberecon al sia spirito en la kolonoj de nia nova kunfrato. Aliaj favore konataj samideanoj, preskaŭ ĉiuj ŝatataj de niaj legantoj: F^{ino} Oxenford, S^{roj} Brunet, Karl Zacherl, Carles, D. H. Lambert, helpas per sia talento la ageman Direktoron, nian amikon Fize. Ĉiuj estas fervoraj partianoj de la Zamenhofa Esperanto.

A. M.

« Tra la Filatelio » Jare 2 fr. (80 sd.), Béziers, France.

Ĉar ni parolas pri la Zamenhofa Esperanto, la sola, kiun ni uzas, ni rememorigu, ke la plej bona propagandilo estas la « **Ĉefeĉaj Ŝlosiloj** », kiuj ricevis aprobojn kaj gratulojn de ĉiulandaj esperantistoj kaj de D^{ro} Zamenhof mem. 1 ekz. 5 cent. 100 ekz. kostas nur 3.50 frankoj afr. Jam aperis la jenaj eldonoj: angla, franca, germana, itala, sveda, hispana, dana, portugala, hungara, bohema, rusa.

Oni skribu al: *Internacia Propagandejo Esperantista*, Merton Abbey, London S. W.

Aperis ankaŭ *La Spritulo*, internacia ilustrata gazeto por serĉo, humoro kaj satiro, 3 fr. (1,20 sm.) ĉe Bereiter & Meissner, Leipzig, Germanujo.

Inter novaj verkoj ricevitaj ni citu *Ifigenio en Taurido*, de Goethe, tradukita de D^{ro} Zamenhof. (2 fr. ĉe Hachette kaj K^{io}).

La sama firmo eldonis *Makbeto*, de W. Shakespeare, tradukita de D. H. Lambert, el Oxford.

De alia Anglo, Generalo Cox, *Aladin aŭ la Mirinda lampo*, el la mil kaj unu noktoj.

Prozo de Danaj-Norvegaj aŭtoroj, tradukita de Zl. Th. Thomsen, prez. de la klubo esperantista en Kristiania. Prezo 1 fr. (0,40 sm.) Aĉetebla ĉe ĉiu Esperanta librovendejo.

Ni ne povas detale paroli hodiaŭ pri tiuj verkoj, ĉiuj bonegaj, kiuj estos pli poste analizataj, ni nur konsilas, ke la feliĉaj kongresanoj tuj aĉetu *Ifigenio'n*, por la teatra prezentado en Dresden'o.

Ĉar ni parolas pri la kongreso, ni sciigu ke nia direktoro, pro grava profesia misio, ne povos ĉeesti la kongreson. Li ricevos plezure, kiel la antaŭajn jarojn, fotografaĵojn de niaj lertaj kaj afablaj amikoj, kiuj havos la plezuron ĉeesti nian kvaran grandan manifestacion, kaj kiuj bonvolos helpi nin, por montri al niaj legantoj la ĉefajn epizodojn de la « Kvara ».

« T: I. M. »

La abonantoj ricevos la enhavon de la II^a Jaro kun la Aŭgusta-Septembra N^o.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

MARKO LIVERITA

FLOR ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas de la konsilado kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE


MARKO LIVERITA

CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparaĵoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. L. GUYOU & J. FÈVRE
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista
Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCOJE. —
11 f 50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj
impostoj.

ALILANDE. — 4 f ĉiu botelo
prenita en St Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por
Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).

Legu DUONSURDA kaj
UNUA ĈAPITRO.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,

Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warmier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

LA
ĈEFA
COKOLADO KUN LAKTO
EN LA MONDO

D. PETER, Kreinto, VEVEY (SVISLANDO)

L'Etoile Espérantiste

MONATA ORGANO

en Franca kaj Esperanta lingvoj,
por la propagando de la

Zamenhofa Lingvo.

Jare: Fr. 2 (en Francujo 1,25).

Cefredaktoro: P. FRUCTIER,
3, rue Sophie Germaine, Paris.

S^{ro} Pion, Société Générale, Beaune (l'Or) Francujo, deziras korespondi kun samideanoj en Dan., Sved., Norveg., l'Alger, Transval., Hind., Hispan., Siber Aŭstrallando; li deziras interŝanĝi es antistajn gazetojn.

PRESISTOJ !! Fotografisto volas v serion da memfaritaj poŝtkartoj ilust kun bildoj el Holanda Indio, taŭgaj por produkto. Adresu proponojn al J. Oli Meester Cornelis, Indes Néerlandaises.

POŝHORLOĜO

"L'ESPERO"

FAVORAJ PREZOJ POR NIAJ
ABONANTOJ.

Por Sinjoroj: 30 fr. (12 sm.).

Por Sinjorinoj: arĝenta, 45 fr. (18 s ora 90 fr. (36 sm.)). Oni aldonu al la m la abonon banderolon.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Marich Agoston, 1 udapest IX. Ŭllöi-ut 59. IV, 8.

Voëo de kuracistoj. — Monata organo por internacia korespondado de kuracistoj en aferoj profesiaj, etikaj kaj social-medicinaj. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.) ĉe D^{ro} Stefan Mikolajski. Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:
ESPERANTO VERLAG MOLLER & BOREL,
Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo, nun reformema: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literatura — Scienca. Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1an de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe British Esperanto Asocio, Museum Buildings, High Holborn, W. C. London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉe la administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3 k. por Aŭstrio Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Esperantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p B: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.).

Filipina Esperantisto. — Organo de Filipina Esperanto Asocio. Jare 5 fr. (2 Sm.) P. O. Box 326, Manila.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — No 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.) Warszawa. Hoza, No 40, m. 8.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanäs, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Luthhof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Gi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.).
Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila No. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja Noj. 2,40 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de
FRANÇOIS COPPÉE,

Año de la Franca Akademio,

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.

75 c. — 30 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd. ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA RESTORACIO ANONCAGENTO. 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e.
Bona familia kuirajo je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton.
C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».

—> S^{ro} Ch. Schefy (?) bonvolu sciigi kial, antaŭ 2 monatoj, li sendis al ni 37 frankojn sen ia ajn sciigo.

Fraŭlo-junulo deziras korespondadi per leteroj-fotografajoj kun Italaj, Konstantinopolaj kaj Afrikaj geesperantistoj. Adreso: Rusujo. Permskaja gub.; zavod Lisva, psal. Evgeniu Bogolubovu.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 x 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj
kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo,
33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribleroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantazioj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTEYCK, Presisto, Bruĝo.